

Enhavtabelo:

3 *Augusto Casquero: Esperanto en pola gazeto „Rzeczpospolita”*

HOMOJ EKSTERORDINARAJ

- 4 *Interparolo kun Etsuo Miyoshi, aperinta en „Rzeczpospolita”.*
10 *Andreo Kler / Danuta Kowalska: Louis Braille (1809-1852).*
13 *Georgo Suchno: Stalin kaj Esperanto.*
15 *Miroslaw Kossakowski: Remigiusz Kossakowski (1931-2004).*
-

LINGVA ANGULETO

- 17 *Czeslaw Baranowski: La prepozicio TRA en praktika uzado.*
-

AKTUALE – POLEMIKE

- 19 *Wladyslaw Burszta: Pri la milito en Irako.*
-

AKTUALE – MOVADE

20-34 *Diversaj primovadaj informoj, raportoj, novaĵoj.*

REDAKTORE

- 35 *Kazimierz Leja: Predike sed malefike...*
-

- 36 *Zbigniew Tylkowski: Humuro...*
-

Kovrilpaĝe: paĝo el la gazeto „Rzeczpospolita” kun sponsorata artikolo de Etsuo Miyoshi.

pola
esperantisto

Socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare. Eldonas: Eldonejo HEJME • <http://www.hejme.e-tools.pl> • Redaktoro: Kazimierz LEJA.

**Ĉiujn korespondadojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro:
PL 41-250 Czeladź, skrytka 59; retpoŝto: kleja@hejme.e-tools.pl.
tel: (+48 32) 265 00 38**

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644.
Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:
UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>

N-ro 5/2004 • ISSN 0032-2431 • Eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

ESPERANTO EN POLA GAZETO „RZECZPOSPOLITA”

La 25an de septembro, en la pola gazeto „Rzeczpospolita”, grandformata, probable la plej aĉetata en Pollando, aperis grandega artikolo pri Esperanto. Du trionoj de tiu granda paĝo okupas intervjuo de la pola ĵurnalistoesperantisto Roman Dobrzynski al la japana industriisto, esperantisto, Etsuo Miyoshi, „reĝo de la gantoj”, titolita „Kial mi investas en Pollando”.

En ĝi amplekse Etsuo Miyoshi klarigas kiamaniere, pere de la kunlaboro kun la polaj esperantistoj, li malfermos novan fabrikon en Pollando. Krome kaj ankaŭ tre amplekse li parolas pri Esperanto.

En la tria triono de la paĝo aperas ampleksa informo pri Esperanto, verkita de Pola Esperanto-Asocio, kie ankaŭ aperas la adreso kaj telefonnumero de tiu pola asocio.

Tiu artikolo havis grandegan efikon. Amaso da poloj legis ĝin, agrable surpriziĝis konante, eble unuafoje, kio estas Esperanto, kaj vidante kiajn avantaĝojn ĝi havas, interalie por krei industriojn en Pollando, ege bezonataj, ĉar tiu fabriko estos konstruita en la bela kaj historia urbo Malbork, kie la procento de senlaboruloj estas 30%.

En la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo okazis tuj poste studadesion, kaj al la inaŭguro venis kelkaj ĵurnalistoj, kiuj volis havi pli da informoj pri Esperanto, kaj poste aperis diversaj artikoloj en polaj gazetoj, eĉ kun fotoj de la gestudentoj kaj profesoroj, kaj okazis kelkaj intervjuoj en radio, kaj eĉ informoj en televido.

La artikolo en Rzeczpospolita estis ege bone kaj lerte prilaborita de Roman Dobrzynski, kaj certe la opinio pri Esperanto, kiun ĝenerale ne ĉiam estas tro pozitiva en Pollando, ĉefe pro manko da informoj, draste ŝanĝiĝis. Rezultoj certe baldaŭ venos.

Augusto Casquero

[red] Al tiu ĉi sciigo ni aldonu, ke en la informa parto de la aperaĵo, verkita de PEA, estas neniu mencio pri *Pola Esperantisto* aŭ Eldonejo HEJME, kiu eldonis kelkajn lernolibrojn de Esperanto. Bedaŭrinde.

Sekvontpaĝe ni aperigas la tutan Esperanto-version de la artikolo, provizitan al la redakcio pere de Roman Dobrzyński.

HOMOJ EKSTERORDINARAJ

*Interparolo kun Etsuo MIYOSHI, la prezidanto de „Swany”
— korporacio.*

Kial mi investas en Pollando?

S-ro prezidanto vi estas nomata „reĝo de la gantoj”. Ĉu vi kapablas kudri gantoparon?

Jes, mi eltranĉus gantomodelon kaj mia edzino Yoshiko ĝin kudrus. Ni ankoraŭ ne estis geedzoj, kiam ni faris tion en la fabriko de mia patro en Shirotori sur la insulo Shikoku en Japanio. Tio estis manufakturo enlaboriganta 40 personojn.

Nun vi administras la korporacion „Swany”, kiu enlaborigas mil kvincent laborantojn en kvar fabrikoj en Ĉinio kaj vendofilio en Usono kaj ĝiaj enspezoj egalas al 50 milionoj da euro jare. Kiel tio okazis?

Ĝis la 1964 fine de la jaro oni ĉesigadis la produktadon kaj la laborantaro estis maldungata ĝis aprilo. Mi decidis ŝanĝi ĉi tiun aferstaton, sed unue mi devis trovi la vendomerkatojn en landoj malpli varmaj ol Japanio, nome en Usono kaj en Eŭropo. Mi forveturis tiu ĉi cele kun la kono de la angla lingvo alproprigita dum la jaroj da lernado en lernejo. Evidentiĝis, ke mi eĉ ne sukcesas mendi manĝaĵon. Finfine mi dungis tradukistojn por viziti klientojn. Samtempe mi ekkonsciis, kiom grandegan problemon por la nuntem-

pa mondo kreas la lingvobarieroj.

Kiel vi superis ilin?

Sturmintense mi eklernis la anglan per la japana nacia radio. Por ekzer-ci pronocadon mi aŭdigis sonbendon dum ŝoforado kaj laŭte ripetadis la paroladon de John Kennedy. Mi devis ripeti ĝin 700 fojojn por pli-malpli ekregi la prononcon. La angla estas aparte malfacila pro la plursignifo de la vortoj kaj komplika prononcado, ekzemple la vokalon „a” oni prononcas laŭ 7 diversaj manieroj. Pli-malpli samperiode mi renkontis la internacian lingvon Esperanto kaj mi ekkonsciis la geniecon de tiu ĉi pola inventaĵo.

Kiel vi renkontis Esperanton?

Tio okazis en la 1965 jaro. Mi legis libron, en kiu ĝia aŭtoro s-ro Kyotaro Deguchi priskribis sian mondvojaĝon per Esperanto Li interalie vizitis la patrujon de Esperanto, Pollando, kaj dum la E-kongreso en Bulgario akiris premion en oratora konkurso. Japano gajnanta konkurson oratoran en la fremda lingvo? — tio estis neimagebla. Mi raviĝis pri Esperanto kaj decidis iam lerni ĝin. S-ro Deguchi estis konata figuro inter la adeptoj de Oomoto.

Kio estas Oomoto?

Temas pri derivaĵo de ŝintoismo, domininta en Japanio antaŭ ol alvenis budhismo. Oomoto celas la kunagadon inter la religioj, do la ideo de la internacia lingvo trovis tie fekundan grundon. Pro iuj cirkonstancoj Oomoto ludis gravan rolon en mia persona vivo.

Ĉu vi povus malkaŝi tiujn cirkonstancojn?

Kiam mi estis bebo, mi malsaniĝis je poljomjelito, la viruso lezis mian dekstran piedon. Tamen en la juna aĝo, malgraŭ la handikapo mi kolektis kuraĝon por prezenti amdeklaron al studkolegino. Ĝi estis brutale rifuzita. Tiam mi perdis la vivemon kaj provis minmortigi. Bonŝance mi estis savita de la plej proksima familio. Poste, dum kelkaj semajnoj mi estadis en la spirita centro Oomoto, kie mi konatiĝis kun la simpla vero: „Ĉiu enmondiĝinta homo havas gravan rolon ludendan en la vivo”. Tiu malkovro revenigis al mi la memfidon kaj sekve stimulis la kuraĝon alprenadi malfacilajn decidojn.

Ekzemple?

Mi cirkulis la terglobon pli ol centfoje kaptante klientojn per malalta prezo kaj alta kvalito de niaj produktoj. Sekve de tio el la provinca manufakturo ni transformiĝis en korporacion kun internacia signifo. Laŭ la angla vorto mi nomis ĝin „Swany”, omaĝante tiel mian hejmlokon Shirotori, kies nomo egalsignifas „Cigno”. Dekkelkajn jarojn poste oni ekaĉetis

la malplikostajn koreajn gantojn. Por konkurenci ni translokis la fabrikon al Koreio en 1972.

Certe aperis laŭvica lingvoproblemo.

Efektive, mi obstine lernis la korean kun privata instruisto. Ĝi estis pli facila ol la angla, sed ankaŭ ĝi rabis multe da tempo. Bedaŭrinde baldaŭ ekĝenis nin la severa ĉina konkurenco kaj dum 1984–89 mi establis 4 fabrikojn en Ĉinio.

Ĉu vi ellernis la ĉinan?

Ĝuste en Ĉinio mi decidis ne plu perdi la vivotempon por lerni laŭvicajn, malfacilajn lingvojn. En 1995 mi eklernis Esperanton. Mi venigis instruiston el Novzelando kaj lernadis Ĉiuvespere 3 horojn. Laŭ mia takso mi bezonis 1/5 da peno ol por la angla kaj mi parolas pli bone. Mi aldonu, ke Esperanton mi komencis lerni en la 55a vivojaro. Kiel sciate en tiu aĝo la memorkapablo komencas jam iom trompi. Hejme ni havas kvar katojn kaj tri hundojn prenitaĵoj de la strato. Mi donis al ili Esperantonomojn. Mia nepino parkeris ilin tuj, mi bezonis por tio iom da tempo.

Kiel oni konfesas en Esperanto amdeklaron? (La demando estas starigita en la pola laŭvorte: Kiel oni diras en Esperanto: Kocham cię!)

Mi amas vin! (*respondo en Esperanto*)

En kio konsistas la facileco de Esperanto?

Ĝi posedas 16–regulan, senesceptan gramatikon kaj logikan vortfara-

dan sistemon, kiu ebligas krei multajn vortojn el malmultaj radikoj helpe de afiksoj. Ĉiu litero havas nur unu prononco kaj la akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

Sed ĝi estas lingvo artefarita!

La „artefaiteco” apartenas al la esenco de la homeco. Ĉu eblas kritiki la homon, ke li ekdomnis fajron, inventis radon kaj produktas aviadilojn? Cetere akuzi la lingvon internacian pro ĝia artefariteco estas ne tute prava. La gramatikaj reguloj kaj la vortprovizo de Esperanto estas prenitaj el naturaj lingvoj. Vi kiel polo verŝajne komprenas duonon da Esperanta vortprovizo sen konsulti vortaron. Centoj da internaciaj lingvoj estis elpensitaj ekde la mezepoko, sed gajnis parolantojn kaj plu vivas nur Esperanto.

Internacian lingvon eĉ plej facilan oni devas lerni, la patra lingvo estas alproprigata senpene.

Mi konas multajn, tiel nomatajn „denaskajn esperantistojn”, kiuj heredis la internacian lingvon. Plej ofte temas pri infanoj de miksitaj geedzaj paroj, ĉe kiuj Esperanto rolas kiel komuna familia lingvo. Estus facile imagi la situacion, ke infanoj nature alproprigos al si Esperanton kune kun la gepatra lingvo. Estas nur bezonata ĝenerala decido enkonduki en la internaciajn rilatojn la neŭtralan internacian lingvon apud la lingvoj naciaj.

Prave, sed la lingvo estas portanto de kulturo. Kia kulturo kaŝiĝas malantaŭ Esperanto?

Neniu esperantisto forĵetas sian na-

cian kulturon. Al Esperanto oni povus riproĉi ne pro manko de kulturo, sed pro tio, ke ĝi tro radikas en la eŭropa kulturo. Bonŝance Esperanto nun spegulas la kulturon de la tuta mondo. Vidu foton de la denaskaj esperantistoj, ili estas portantoj de la Esperanta kulturo. Mi aldonu, ke ne pasas tago, ke ie en la mondo ne aperus libro en tiu ĉi lingvo. La Esperanto–Muzeo en Vieno, kiu estas fakte filio de la Aŭstria Nacia Biblioteko, havas kolekton de ĉ. 20 mil libroj. Oni produktas sonbendojn, muzik–diskojn, teatraĵojn ktp.

Kiamaniere Esperanto adoptas novajn vortojn, se ĝia kreinto delonge ne vivas?

Ludoviko Zamenhof malsame ol liaj pluraj antaŭuloj ne asertis, ke li finverkis la lingvon, li sole ĝin iniciatis, li konstruis lingvomekanismon, kiu ebligis al Esperanto memstaran evoluon. Ĝi adoptas novajn vortojn en maniero natura kiel ĉiu lingvo. Kiam aperis la vorto „eŭro” — elpensita cetere de nederlanda esperantisto — ĝi estis aŭtomate adaptita de Esperanto. Tiu vorto cetere povas roli ne sole kiel substantivo „eŭro”, sed ankaŭ kiel adjektivo „eŭra”, kiel adverbo „eŭre”, kio aperas en neniu alia lingvo. En pluralo ĝia formo sonas „eŭroj”. Por kapabli krei tiujn vortojn, sufiĉas fini elementan kurson de Esperanto.

Ni premisu, ke Esperanto estas inventaĵo genia. Sed kiu ĝin subtenas?

Papo Johano Paŭlo la 2a uzas Esperanton almenaŭ dufoje jare dum salutoj okaze de la Kristnasko kaj Pasko!

Mi povas elnombri grupon de Nobel-premiitoj, kiuj subtenas Esperanton. Mi menciuj ekzemplodone mian amikon, profesoron Reinhard Selten el Germanio, kiu flue uzas Esperanton. La Ĝenerala UNESCO-Asembleo jam trifoje proklamis rezoluciojn, en kiuj estis rekonitaj la valoroj de Esperanto sur la kampo de intelekta internacia interŝanĝo kaj proksimiĝo inter la nacioj,

Kiom da esperantistoj ekzistas en la mondo?

Mi pensas, ke ĉ. unu miliono. Universala E-Asocio havas ĉ. 30 mil membrojn en 117 landoj. Post la angla Esperanto estas la plej uzata lingvo en interneto internacie. 12 radiostacioj elsendas Esperante, en Vatikano, Pekino, Havano. Radio Polonia emisias siajn E-programojn jam 45 jarojn kaj ricevas plej multajn leterojn en la tuta poreksterlanda programo de Pola Radio.

Kie kaj kiel oni uzas Esperanton?

Siatempo mi varbis E-isntruiston per interreto. Ene de semajno ĉ. 100 kandidatoj el 22 landoj sin proponis. TEJO gvidas la tn. „Pasportan servon”, ĝi publikigas adresojn de esperantistoj el la tuta mondo, kiuj pretas gastigi „mondvojaĝantojn, kiuj konas Esperanton”. En la lasta eldono mi trovis 1286 adresojn. En mia hejmo mi jam gastigis homojn el Svedio, Vjetnamio, Pollando kaj pli ol 10 aliaj landoj. Kelkmiloj el ĉ. 70 landoj partoprenas E-kongresojn tute sen interpretado. En 2002 ĝi okazis en Brazilo, 2003 en

Svedio, ĉijare en Pekino kaj 2005 okazos en Vilno. La 72an jubilean kongreson en Varsovio en 1987 okaze de la centjariĝo de E-o, partoprenis 5946 esperantistoj.

Kion oni faras dum tiaj kongresoj?

La programo de la kongresoj estas tre riĉa. Funkcias dum ili eĉ kongresa universitato, en kies kadro lekcias profesoroj de altlernejoj el diversaj landoj. E-kongresoj estas ankaŭ grava kultura aranĝo. Oni ĝuas familian rendevuon, en kiu ĉiuj havas memfidon, ĉar interparolas sen kompleksoj, egalrajte. La kongreso en Pekino aparte plaĉis al mi, ĉar ĝia ĉeftemo respegulis mian vivcelon: „La lingvoegaleco en la internaciaj rilatoj”.

En la historio de la homaro pli fortaj nacioj ĉiam trudis siajn lingvojn al la malpli fortaj. Same estas nun, dominas la angla.

Esperanto montras la vojon eliri el tiu erara cirklo. La anglan parolas nur 7% de la homaro; por la grandega plejmulto ĝi estas treege malfacila lingvo. Sed milionoj studas ĝin kun mizeraj rezultoj. Dum anglalingvuloj povas studi ajnan fakon, aliaj devas pene alproprigi la anglan. En Bruselo 800 dunganoncoj jare postulas denaskajn angloparolantojn. Tio estas maljustaĵo.

Ĉu pro tio Vi publikigis serion da artikoloj favore al E-o i.a. en „Le Monde”, „Die Zeit”, „La Repubblica” kaj aliaj? Kion vi celas?

Antaŭ kelkdekjaroj la japana transportkompanio „Jamato” aperigis tut-

paĝan artikolon en la „Japana Ekonomia Ĵurnalo”. Tiel la popolo ekkonis pri la malliberaj transportreguloj kaj ekfontis publika diskuto. Rezulte la japana registaro draste liberigis ilin. Poste la prezoj de transportado malaltiĝis je 30% kaj la livertempo duoniĝis, kio donis grandan konkurencon povon en tuta Japanio. Mi kredas, ke kampanjoj en amaskomunikiloj estas ankaŭ bona maniero por atentigi homojn pri la lingva problemo.

Kiel akiri la necesan kapitalon por tiu ĉi celo?

La konkurenco en la ganta induŝtruo estas tre severa. Bonŝance la bezono estas la patrino de inventoj: mi inventis „sakbastonon”, kies la angla nomo registrita en la mondo estas „Walkin’ Bag”. Okazis, ke mia maldekstra piedo dum jaroj troŝarĝata, komencis rifuzi bone funkcii. Mi devis utiligi la lambastonon. Iun fojon mi rimarkis, ke la bastono ne devas esti alimetata ĉiupaŝe, sed povas rulmoviĝi. Dum vojaĝoj mi ĉiam bezonas etan valizon aŭ aktujon. Mi ekhavis la ideon fiksi ĝin je la rulbastono. Post penaj eksperimentoj mi prilaboris la prototipon de la arangaĵo. Ĝi estis patentumita en la tuta mondo kaj tuj fariĝis la eksporta furoraĵo de mia firmao. Lastjare la direktoraro de „Swany Co.” decidis, ke mi rajtas elspezi 10% de la profito, kondiĉe ke mi rezignu al la kompanio la patento-raĵton. Tiel mi akiros monon por popularigi la lingvon internacian.

Ĉu tian defion Vi povos venki?

Mi alfrontis ĝin sub la influo de kelkaj interesaj spertoj, interalie en Pollando. Maje ĉi tiun jaron mi estis en la Teknika Universitato en Lublin. Tie mi konatiĝis kun senatano s-ino Irene Kurzepa kaj en la trajno al Varsovio kun la parlamentano s-ro Paweł Pencyliusz. Ili montris tre pozitivan sintecon por mi pro mia agado kaj tio ege kuraĝigis min. Tial mi decidis inviti ĉiujn 54 polajn EU-parlamentanojn, dekelkajn registarajn gravulojn, kaj amaskomunikilojn al lingva lunĉo-debato, kiu okazos en la hotelo „Victoria” en Varsovio la 26an de septembro, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj.

Bonvolu diri pli da detaloj pri la programo.

Pri la graveco de la neŭtrala lingvo prelegos prof. Selten, la Nobelpremiito, prof. Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de Esperanto kaj s-ino Małgorzata Handzlik, pola EU-deputito ĵus elektita junio.

Ĉu vi konsideras, ke poloj havas specialan mision ĉirilate?

Esperanto estas ĉie en la mondo konata kiel pola inventaĵo. Mi ne devas vin konvinki, kian ŝancon povas akiri Pollando rezulte de disvastigado de Esperanto. Laŭ mia opinio oni amase vizitos la lulilon de Esperanto kaj ĉiuj kampoj de via lando certe vigliĝos. Precipe la E-parolado de poloj estas pintnivela, do polaj instruistoj aktivos tra la mondo. Oni povas diri, ke la Dia providenco donacis al Vi Zamenhof. Cetere mi konsideras, ke 85% de ne-angluloj ne donos eternan pril-

vilegion al nur 15% da anlalingvanoj en Eŭropo.

Fakte en aprilo 2004 ĉ. 120 deputitoj de la Eŭropa Parlamento deklaris sin favoraj al E-o, dum ĉ. 160 elektis multlingvan sistemon, kiu verdire koncentriĝas al angla. Tio multege efikas al via celo?

Kompreneble. Ĝis aprilo aktivis 624 EU-parlamentanoj, nun 732, post la aniĝo de 10 landoj kun 108 deputitoj inkluzive 54 poloj. Jen reala forto kapabla establi leĝan bazon por la lingva egaleco.

El kio sekvas via interesiĝo pri Pollando?

Por mi Pollando estas unuavice la naskiĝlando de Esperanto. Mi havis polajn korespondantojn. Foje mi vizitis Varsovion, la lulion de Esperanto. Mi havis renkonton en esperantista klubo. Jam enkonduke mi aŭdis: „Bonvolu rakonti pri vi mem”. Mi flankenmetis la preparitan prelegon kaj mi komencis paroli. Subite mi ekkonsciis, ke la unuan fojon en mia vivo mi parolas la fremdan lingvon sen preparo. En

julio 2003 mi venis al Malbork laŭ invito de la loka esperantista klubo, kiu de kelkaj jaroj realigas belan ideon — Parkon de la Mondo. Mi malkovris la memorŝtonon apud ĉerizujo, kiu simbolas Japanion.

Se mi bone scias, vi planas investaĵon en Malbork. Ĉu nur pro sentimentaj kialoj?

Ĉi-okaze mi eksciis, ke la problememo de Malbork estas prema senlaboreco, kvankam la urbo havas bonan situon proksime al la haveno en Gdansko. Mi povas dungi vendistojn, kiuj parolas ne nur E-on sed ankaŭ la anglan, francan, germanan kaj rusan. La urbestro s-ro Wilk konvinkis min, ke Malbork povas fariĝi nia porde en Eŭropo. Post unujaraj konsultoj ni decidis investi en la urbo du milionojn da eŭroj por produkti „sakrulbostonon”, Walkin’ Bag.

Ni esperu, ke Malbork fariĝos la ĉefurbo de tiu utila inventaĵo. Mi dankas pro la interparolo

Interparolis:

Roman Dobrzyński

Marjoren el Francio, Maja el Israelo, Zdrawka kaj Tina el Kroatio — partoprenintinoj de la Internacia Junulara Kongreso en Kroatio. En la mondo ĉirkaŭ 1000 infanoj uzas Esperanton denaske.



Louis Braille [Lui Braj] (1809–1852)

Li okupiĝis pri la alfabeto por blinduloj.

Luis Braille naskiĝis la 4an de januaro 1809 en la vilaĝo de Coupvray [Kuvre] en departemento Seine et Marne [Sen e Marn]. Li estis la kvara filo de selisto. Iun tagon estante trijara li ludis per huferaj elementoj ĉe sia patro kaj trapikis sian okulon per akraĵo. La vundo infektiĝis kaj la inflamo divastiĝis je alia okulo, rezulte de kio li fariĝis kompleta blindulo.

En 1816 Braille komencis lerni en la loka lernejo kaj kiel tre kapabla knabo baldaŭ ekestis la unua el la lernantoj. Iu bienulo kaj la paroĥestro ekinteresiĝis pri la knabo kaj konsilis al liaj gepatroj, ke ili sendu la filon al la lernejo por blinduloj. En 1819 Luiso ricevis stipendion kaj povis kontinui la lernadon en Nacia Instituto por la blinda junularo en Parizo.

En tiu lernejo la blinduloj ripetadis tion, kion parolis instruisto kaj oni legis kelkajn librojn skribitajn per metodo de Valentin Haüy [Valenten Oi] fondinto de la Instituto. Tamen la sistemo estis neperfekta, ĉar la enhavon de maldika libreto ĝi permesis loki en kelkajn dikajn volumojn, krome ne ĉiuj knaboj havis sufiĉan sentopovon en siaj fingroj por rekonii literformojn.

De la komenco Luis okupis sin pri kreo de la alfabeto por blinduloj. Dum someraj ferioj li dum multaj horoj en la laborejo de sia patro konstruis alfabeton per eltondaĵoj el ledo.

Braille manifestis grandan emon al muziko. En Instituto oni permesadis al la knaboj tuŝi instrumentojn, por aŭskulti muzikon gvidante iliajn fingrojn sur la kordoj, aŭ sur klavaro.

Tiamaniere Luis komencis ludi per piano. Lia muzikkapablo estis nekonstestbla.

Pramodelo al Luis estis „la nokta skribo” de kapitano Charles Barbier [Ŝarl Babie].

Li elpensis por noktaj manovroj punktojn kaj strekojn premitajn sur kartono.

Barbier venis al Instituto por demonstri sian sistemon al la lernantoj. Tio kaŭzis grandan intereson de Braille. La knabo praktikis semajnojn la sistemon skribante per ĝi kompletajn frazojn. Por tiu sistemu li aplikis ŝovgvidilon moviĝantan en kadreto. La gvidilo prezentis fenestretojn permesantajn difini punktojn per pinglo-punktigilo. Sub tiun ŝovgvidilon oni metis dikan paperfolion, kiu troviĝis inter la gvidilo kaj la kadreto.

Dum provesploroj Braille konstatis,

ke la sistemo posedas multajn mankojn, ĉar ne prikonsideras interpunkcion, akcentojn, ciferojn, matematikajn simbolojn kaj muziknotojn. Tio estis kialo, le li faris konstante eksperimentojn kun novaj kombinaĵoj. Fine de la jaro 1824 tiu knabo, kiu estis nur 15-jara, kreis sistemon konsistantan el 63 kombinaĵoj de punktoj kaj strekoj, kiuj estis prezentantaj ĉiujn literoj de la alfabeto, akcentojn, interpunkciajn signojn kaj ankaŭ aritmetikajn simbolojn.

La Instituto tre rapide akceptis la sistemon de Luis Braille, ĉar ĝi permesadis fari notojn en la klasoĉambro kaj skribi kompletajn lecionojn. Dume Luis Braille helpis al aliaj lernantoj de Instituto kiel lerni algebron, gramatikon, kaj geografion. Li studis orgenoludon kaj instruis pianoludon al aliaj blinduloj.

En la jaro 1829 oni publikigis la unuan eldonon de Braille sistemo titolitan: „Metodo skribi vortojn, muzikon, kaj simplan kanzonon helpe de punktoj, destinita por blinduloj kaj por ili komponita”. En la antaŭparolo al sia verko Braille redonis honoron al Charles Barbier, ke lia metodo estis la unua invento kiu anticipis tiun de Braille.

En la jaro 1833 Luis Braille estis nomumita estro de Instituto. Li laboris sen interrompo, instruante kaj penante perfektigi sian sistemon. Pro tiu konstanta laboro li sentis grandan laciĝon, naŭzon kaj febroatakojn. Kiel 26-jara li komencis vomii per sango,

kiu estis la komenco de lia ftiza malsano. En tiu tempo nur nemultaj povis savi sin el tiu malsano. Kuracistoj rekomendis nur longe ripozi kaj abunde nutri sin. Post la paŭzo en la laboro daŭranta 9 monatojn Braille eklaboris ree en Instituto, en kiu la ejoj estis humidaj...

En la 1838 jaro li publikigis la libron „Malgranda revuo de aritmetiko por komencantoj”.

Post kelkaj jaroj li eldonis la libron „Kompendio de historio” por blindaj studentoj.

Braille interesiĝis pri la interkomunikado per skribado inter blindulo kaj persono vidanta. Li solvis la problemon en la jaro 1839. La nova metodo uzis punktojn prempresitajn per speciala pinglo. Por fiksi la dimensiojn de la literoj — malfacila problemo por blindulo — Luis aranĝis platan tabulon, kiu indikadis nombron de punktoj postulataj por apartaj literoj. Tiu ĉi nova sistemo, kiun li nomis „radiografio” estis rapide akceptita de la lernantoj de Instituto.

Spite al la esperoj de la instituta direktoro la verko de Braille ne renkontis sin kun iu ajn distingigo sur la nacia platformo. Liaj lernantoj vane petis registaron, ke ĝi donu al Braille la ordenon de Honora Legio. Ministerio de Internaj Aferoj komencis postuli, ke Instituto instruu siajn lernantojn laŭ la sistemo bazita sur latinaj literoj prempresitaj.

En la jaro 1840 venis al Instituto nova direktoro, kiu tuj deklaris sin

kontraŭ la skribosistemo de Luis Braille. Pro malboniĝo de la sanstato Braille devis enlitiĝi dum kelkaj semajnoj.

Kiam li revenis al sia laboro li malkaŝis, ke dum lia malĉeesto ĉiuj libroj skribitaj laŭ lia sistemo estis tute detruitaj kaj ankaŭ, ke la lernantoj aplikas alian metodon bazitan sur la sistemo de Valenteno Aji [Valantun Oi]. Malgraŭ tio la lernantoj alktumigintaj al la metodo de Braille kaj konantaj ĝian avantaĝon aplikis ĝin plu, sed ekster la klaso.

Poste venis al Instituto nova direktoro, kiu estis entuziasmulo de Braille metodo.

Instituto de Blinduloj, kiu dum multaj jaroj lokiĝis en maloportunaj kaj humidaj ejoj, ricevis de la registaro dotaĵon por starigi novajn konstruaĵojn. Dum la inaŭguro oni honoris la sistemon de Braille. Oni legis broŝuron „Relacio koncernanta la anagliptografian sistemon por uzo al blinduloj” kaj aranĝis demonstron por pruvi, ke per tiu sistemo oni povas praktiki. Tiamaniere la verko de Braille disvastiĝis kaj estis aprecita. Tiu sistemo disvastiĝis en Eŭropo. Luis kontinuis la instruadon kaj krome la organludadon en diversaj preĝejoj de Parizo.

En tiu periodo li persiste laboris pri sia sistemo de muziknota skribo. Li intencis inventi la metodon, kiu ebligus al blinduloj precize legi muziksignojn el papero. Post invento de iu sprita aparato li ricevis kontentigajn rezultatojn.

En la jaro 1850 li devis redukti sian aktivecon kaj labori nur dum duona labortempo.

En la nokto je la kvara de decembro en la jaro 1851 Braille travivis atakon de la pulma hemoragio. Ek de tiu tempo li ne estis plu pova ellitiĝi.

La 26an de decembro en la sama jaro li pretigis testamenton, en kiu li destinas siajn valoraĵojn kaj la bienon en Coupvray al sia familio kaj siaj amikoj kaj petas, ke oni ne postulu redoni la monon kiun li prunte donis al amikoj.

Luis Braille mortis la sesan de januaro 1852 kaj estis enterigita en sia gepatra vilaĝo. Blinduloj el la tuta mondo alvenas por viziti lian tombon, malgraŭ tio, ke liaj restaĵoj post translokigo troviĝas en Pariza Panteono. En la modesta domo en kiu li naskiĝis estas nun negranda muzeo.

Luis Braille, kiu dum 30 jaroj de la pacienca laboro dediĉis tiom multe da fortoj al blinduloj mortis preskaŭ nekonzata de liaj samtempuloj. En tiu epoko neniu suspektis, malgraŭ tutmonda transcendismo, ke li ekekzistis por fari sian inventon. Tamen post cent jaroj la nomo de Luis Braille estis jam konata en la tuta mondo. En la jaro 1878 okazis en Parizo kongreso, kiu fine decidis akcepti la alfabeton de Braille kiel la internacian sistemon taŭgan por blinduloj.

En la jaro 1917 Usono, kie dum multaj jaroj oni uzis alfabetojn devenajn, realigis unifikon adaptitan al Brajla alfabeto. Diversspecaj sistemoj

Stalin kaj Esperanto

*Sinjoro Stalin, Vi — granda sciencisto,
En lingvistiko Vi atingis supron.
Mi estas ordinara aestito.
Por mi amiko estas griza lupo.*

*Nun estas mi en turuĥanska tajgo,
Kien iam ekzilis caro Vin.
Vi el „fajrero ekbruligis fajron”,
Kaj dank’ al Vi ĝi nun varmigas min...*

Tielmaniere oni primokis lingvo-sciencajn interesiĝojn de „Amata Patro, Granda Instruisto kaj Korifeo de Ĉiuj Sciencoj” en iam populara ru-



aplikataj en Granda Britujo kaj Usono estis reviziitaj kaj unifikitaj. En la 1950–a jaro laŭ iniciato de UNESKO la Braille sistemon oni disvastigis je diversaj afrikaj dialektoj. La organizacio poste prilaboris rimedojn por apliki la sistemon en orientaj idiomoj.

Do, aktuale la genia invento de la 15–jara knabo estis agnoskita en la internacia forumo kaj Luis Braille oni konsideras kiel unu el la plej grandaj bonfarantoj en la mondo.

Tradukis Andreo Kler el la hispana lingvo surbaze de artikolo lokita en Kuba semajno–revuo „Bohemia” (Nro 37, 1965)

sendis: Danuta Kowalska

sa kanto „Letero al Stalin”. En la komenco de pasinta jarcento preskaŭ ĉiuj adeptoj de marksismo fanatike kredis, ke dank’ al iliaj penoj „el fajro ekbruliĝos flamo”, flamo de tutmonda revolucio, kiu neeviteble ĉirkaŭprenos la terglobon. Kaj sur sangkovritaj ruinoj de marasma malnova mondo oni konstruos helradian estontecon por venontaj generacioj. Ĉi tiun ideon poezie esprimis fama rusa poeto Aleksandro Blok:

*Ni al malĝojo de la burĝoj
Tutmondan brulegon disblovos,
Tutmondan brulegon sangplenan.
Ho, Dio benu nin!*

Fakton, ke tutmonda revolucia movado urĝe bezonas universalan lingvon, komprenis multaj gvidantoj de la movado. Sen komuna ilo de interpopola komunikado, la slogano „Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu!” ne estus plenumbla. Multaj revolucioj supezis, ke ĝuste Esperanto povos helpi al ili turni la „radon de historio”. Kaj Zamenhofa lingvo iom post iom disvastiĝis en revolucia medio.

Stalin konatiĝis kun Esperanto en la jaro 1914 dum sia lasta ekzilo en siberia tajga regiono „Turuĥanskij Kraj”, nomita tiel laŭ la nomo de Turuĥansko, situanta ĉe bordo de la rivero Jenisejo. Pri ĉi tiu fakto el vivo de estonta kru-

ela diktatoro informas la rusa historiisto Dmitrij Volkogonov en sia libro „Stalin”.

La aŭtoro skribis: „Unu tagon Stalin decidis komenci lernadon de Esperanto. Unu el ekzilitoj portis al. li lernolibron, sed la afero finiĝis je intenco...”

Do, Stalin ne fariĝis esperantisto, eble li estis maldiligenta lernanto, krom tio la humana „Interna ideo” de Esperanto evidentiĝis ne koincidebla kun sangavida marksismo.

Sed provo uzati nian „verdan” lingvon kiel ilo de ideologia propagando daŭris. Post la venko de bolŝevisma revolucio en Ruslando tuj reviviĝis Esperanto-movado, kun certa apogo de bolŝevisma reĝimo estis organizitaj Esperanto-kursoj en multnombraj kulturdomoj, lernejoj, fabrikoj, eĉ en milittrupoj de Ruĝa Armeo. Favora atmosfero por la Esperanto-movado daŭris ĝis la mezo de la tridekaj jaroj de pasinta jarcento. Gvidanto de bolŝevisma partio, Lenin, postulis: „Neniu privilegio al. iu ajn nacio, al. iu ajn lingvo!”. Rusaj esperantistoj eĉ impetis al. Lenin frapan sloganon: „Esperanto estas latino de proletaro!”

Sed venis periodo de la „Granda Purigo”, kiam Esperanto-movado en novkonstruita USSR estis kruele sufokita. Miloj kaj miloj da esperantistoj fariĝis senkulpaj viktimoj de krimaj ideologoj. Preskaŭ ĉiuj movadanoj estis arestitaj kiel „malamikoj de la popolo”, poste aŭ pafmortigitaj, aŭ kondamnitaj al. punlaboro en multnombraj tendaroj de „blanka mor-

to” en Siberio. Nun teruraj krimoj de Ruĝa Inkvizicio estas larĝe konataj en Esperantujo.

La „Lodza Informilo” (1/2002) prezentas interesan rimarkon de s-ano Stanisław Mandrak pri artikolo „Stalin diras NE!” el semajna gazeto „Politiko”. Verŝajne la artikolo prilumas atingojn de Stalin en lingvistika branĉo. Menciata libro de Iosif Stalin, „Marksismo kaj problemoj de lingvistiko” (la rusa eldono „Marksizm i voprosy jazykoznanija”, la pola — „W sprawie marksizmu w językoznawstwie”) aperis en la jaro 1950 kaj tuj fariĝis deviga por studado en ĉiuj altlernejoj kaj universitatoj de iama Sovetio.

Menciita en la artikolo aserto, ke en la verko de Stalin „renaskiĝa lia junaĝa interesiĝo pri Esperanto” sonas almenaŭ strange. Ĉar laŭ lingva teorio de Stalin nur en malproksima estonto, kiam komunismo venkos en la tuta mondo, ĉiuj naciaj lingvoj kunfluigos en unu komunan por ĉiuj popoloj lingvon, kiu estos nek la rusa, nek la angla, nek alia el ekzistantaj nun lingvoj, sed ekestos io tute nova. Por nuntempo la problemoj de la internacia lingva komunikado jam estas solvita: la granda kaj potenca RUSA LINGVO estu ĉefa komunikilo komence por ĉiuj popoloj de Sovetunio, poste por popoloj de novaperanta socialisma medio. La teorio de la „Granda lingvisto” estis malpreciza, sed lia lingva praktiko — klara: en USSR daŭris komencita ankoraŭ en la cara Rusa Imperio procezo de totala rusifikado de naciaj mi-

Remigiusz Kossakowski (1931–2004)

Junaĝo

Remigiusz Kossakowski naskiĝis la 1an de aprilo 1931 en Mława. Lia patro devenis el Sandomira regiono, lia patrino estis mazovianino. La patro laboris kiel oficisto de Polaj Ŝtataj Fervojoj, en multaj lokoj, havante diversajn postenojn, lastatempe li estis inĝeniero de fervojtrafika estrado. La patrino estis dommastrino.

Remigiusz frekventis al elementa lernejo kaj atingis maturecon en liceo kun humanista profilo en la jaro 1948 en Sochaczew, kie liaj gepatroj translokiĝis en la jaro 1936.

Muzika profesio

Remigiusz Kossakowski lernis en mezgrada muzika lernejo kaj poste, en la jaro 1960, li finis muzikajn studojn en la Muzika Akademio en Varsovio. Li studis en la fakultatoj pri la solkantado kaj la komponado. Post diplomiĝo li daŭrigis la muzikajn studojn eksterlande en Munkeno, Moskvo kaj Vajmaro. Post la studoj li ricevis titolojn: magistro pri arto kaj artisto–muzikisto.

Remigiusz koncertis kiel solisto de la Nacia Filharmonio, kunlaboris kun aliaj filharmonioj, simfoniaj orke-



noritatoj. Ekzemple, se en tridekaj jaroj de XX jarcento en la tuta lando oni uzadis por instruado 104 naciajn lingvojn, tiam post 20 jaroj la nombro de lingvoj en lerneja klerigado reduktiĝis al. 44. En kelkaj okazoj eĉ la latinan alfabeton, uzatan por antaŭe senskribaj lingvoj oni ŝanĝis al. la rusa „Cirila” skribaĵo.

En la dua duono de pasinta jarcento certa parto de loĝantaro de naciaj respublikoj jam ne scipovis flue paroli en la gepatra lingvo. Eĉ nun, post disfalo de la „Nerompebla Unio de Libe-

raj Respublikoj”, en parlamentoj (ekz. de Ukrainio kaj Blankrusio) kelkaj deputitoj faras paroladojn en la rusa lingvo, ĉar la propran, gepatran lingvon, ili ne scipovas sufiĉe bone. Sekvoj de multjara rusifikado estas malfacile kuraceblaj, sed nun en la nova Ruslando, la lingva situacio ŝanĝiĝis multsignife: lerneja klerigado uzas jam 70 naciajn lingvojn, reviviĝas preskaŭ mortintaj lingvoj de malgrandaj popoloj. Kreskas ankaŭ la rolo de Esperanto kiel plej efika rimedo por internaciaj rilatoj.

Georgo Suchno, 2002-10-15

stroj kaj muzikaj teatroj en Pollando. Li estis bone konata kiel baritonulo el koncertaj estradoj, televidaj spektakloj kaj radiostaciaj surbendigoj. Lia lasta televida scenejkantado okazis en la jaro 2003. Li kunlaboris kun kelkaj ĥoroj, inter alie kun la Pola Asocio de Ĥoroj kaj Orkestroj, la Klubo „Kantoj kaj arioj”, la Varsovia Orienta Ensemblo kaj la Varsovia Ĥorkanta Ensemblo. Dum 20 jaroj li kantis kun la kanta kvarteto „Beltono”. Li koncertis en multaj eŭropaj kaj amerikaj landoj, kante en pli ol 10 lingvoj. Dum multaj jaroj li kantadis sur operaj scenejoj en Germanujo, Italujo kaj Francujo. Li surdiskigis malnovtipajn longdaŭrajn diskojn kaj novtempajn kompaktnajn diskojn kaj ankaŭ la kasedojn kun siaj kantoj.



Li estis distingita per la kavalira kaj oficira krucoj de la franca Honora Legio de Civitana Eduko, la pola Ora Kruco de Merito kaj multaj ministeriaj kaj organizaciaj medaloj.

Esperantista aktiveco

Remigiusz Kossakowski esperantigis kaj enskribigis al Pola Esperanto-Asocio en la jaro 1948. Li fariĝis dumviva membro de PEA en la jaro 1966. Dum kelkaj elektoperiodoj li funkciis kiel membro de varsovia Estraro de PEA respondeca pri kulturo. Ankaŭ li

partoprenis en la Kultura Konsilantaro de la Ĉefa Estraro de PEA.

Li estis konata veterano de la esperantista movado. Ekde la jaro 1960 li kantis dum multaj esperantistaj imprezoj kaj kongresoj en Pollando kaj eksterlande. Dum la 72a Universala Kongreso en Varsovio en la jaro 1987 li gvidis „La artan vesperon polan”. En lia repertuaro troviĝis pluraj kantoj en Esperanto. Plimulton de la tekstoj li mem tradukis. Li komponis

muzikaĵojn por Esperantaj tekstoj, inter alie por L. L. Zamenhof: „Preĝo sub la verda standardo” kaj „La vojo”, ankaŭ por „Kongresa preĝo”, „La vera frataro”, „Vojo, vero, vivo” ktp. Li kunlaboris ekde la jaro 1976 kun la ensemblo „Muzilo” kiel konstanta konsultanto.

Pola Esperanto-Asocio distingis lin en

la jaro 1976 per la insigno de Merita Esperantisto.

Finaj tagoj de la vivo

Remigiusz Kossakowski entute malsanis nur 45 tagojn. La kaŭzo de lia morto estis kancera tumor de la hepato. Li mortis la 10an de marto 2004 en hospicio en Wołomin. La funebro okazis la 17an de marto 2004 kaj li estis entombigita en la familian tombon de Bródno-tombejo en Varsovio.

Miroslaw Kossakowski

Czesław Baranowski

La prepozicio **TRA** en praktika uzado

La prepozicio **tra**, esprimanta **tramovon**, estas sufiĉe ofte uzata de Esperantistoj. Ni tamen devas atenti, por ne konfuzi ĝin kun la prepozicio **trans**, ĉar **transmovo** iras super aŭ sur io kaj **tramovo** iras ene de io. Plej bone montros tion elektitaj ekzemploj.

La prepozicion **TRA** oni povas uzadi en la jenaj situacioj:

1. **Kiam la movo komenciĝas ĉe unu ekstremo kaj atingas la alian.** Ekz.: Somere multaj ripozantoj promenas **tra** la ĉefa strato de Mielno. En la sama ripozloko oni povas agrable veladi **tra** Jamno-lago. Pasintjare mi havis okazon vagi **tra** la sabloza pola dezerto troviĝanta inter Ustka kaj Łeba. Mia amiko longe migris **tra** la tuta mondo. Somere ni veturis per ŝipo de Hamburgo al Gdansko **tra** Kopenhago. Agrable estas vojaĝi ŝipe **tra** la Balta Maro. Mi ofte laboras kiel ĉiĉerono **tra** antikvaĵoj kaj vidindaĵoj de Koszalin.

Rimarko: La movo ne ĉiam iras strikte de unu flanko ĝis la alia, sed neprecizigite de loko al loko ene de la

afero. Ekz.: La soldatoj kondukis arestitojn **tra** la stratoj (ili iris de iuj lokoj en la stratoj al aliaj lokoj en la stratoj). Bela muziko sonis **tra** la festaj salonoj (ĝi sonis de loko al loko ene de la salonoj).

2. **Kiam la movo, komenciĝinte antaŭ iu loko, pasas tiun lokon kaj daŭras plu.** Ekz.: **Tra** la fenestro de nia ripozdomo ni vidis la maron. **Tra** densa mallumo briletis nur unu hela stelo. Mallarĝa vojeto kondukas **tra** tiu ĉi kampo al mia domo. **Tra** la pordo rigardis internen la stelplena ĉielo. Li rigardas ĉion **tra** sia persona vitro. Io profunde sentata briletis **tra** la petolajoj de ŝiaj vortoj.

3. **Kiam la ago daŭras la tutan tempon ekde la komenco.** Ekz.: La koko kriis **tra** (dum) la tuta nokto. Mi volonte restos **tra** kelka tempo en via nova domo.

Rimarko: Por klare montri, ke movo plene trairas kaj pluiras el la loko oni povas uzi por klareco la prepozicion **tra** + direktan N-finaĵon. Ekz.: Miaj brakoj estas sufiĉe fortaj, por porti vin **tra** la arbaron (la tutan vojon **tra**

la arbaro kaj el ĝi).

La sago iris **tra** lian koron (ĝi plene penetris lian koron).

4. La prepozicio **tra** estas uzata malofte kiel **memstara elemento (vortero)**, ekz. **trae**. Kavaleristo tranĉis malmikon **trae** per unu frapo de glavo. **Trae** de ĉiuj viaj grimacoj mi vidis la veron en viaj okuloj. Li iris **trae** de la ponto.

5. La prepozicio **tra** funkcias ankaŭ kiel **prefiksoido, signifanta ion faritan:**

a) **de komenca ĝis fina loko (punkto) aŭ momento.** Ekz.: Mi **traveturis** per aŭto la tutan Eŭropon. La feliĉo **trapenetr**is tiam mian koron. Ege impresis min **tramara** vojaĝo. Ni devis **trairi** riveron naĝante. Trinkante bongustan vinon ili **trababilis** la tutan vesperon. Ekskursantoj **tranoktis** en privata gastejo, nur kelkaj el ili **tradancis** la nokton. Li **travivis** sian junecon en malliberejo. Mi **trarigardis** jam la libron ricevitajn de vi, sed nun mi devas atenteme **tralegi** ĝin. Por trovi okulvitojn li **traserĉis** ĉiujn angulojn de sia ĉambro. Lia parolado estis **triplektita** per diversaj citatoj. Vespere ili **tralavis** la gorĝon (= drinkis) kaj poste **tradormis** interesan filmon. Laboristoj **trahakis** truon en la muro. Por konstrui la tunelon oni devis **trabori** monton. Mi jam **trakopiis** la fotojn, pri kiuj vi interesiĝis. **Tranuba** sunbrilo ankaŭ brunigas la haŭton. La nokta ĉielo estis **trapikita** de steloj. Kelkfoje pluvo **tragutadis** **tra** la tegmento de mia domo. Koncizaj raportoj pri la 89. UK

de Esperanto en Pekino **trakuris** jam Esperantujon.

b) **de komenca ĝis fina grado de plenumo (komplete, tutplene).** Ekz.: Mia amiko **tradandis (fordandis)** en Parizo la tutan monon. Dum unu nokto li **tradiboĉis (fordiboĉis)** ĉion, ĝis lasta ĉemizo. Vintre multaj senhejmuoj estas **trafrostitaj (elfrostitaj)**. Tineoj **tramangis (formangis)** mian lanan puloveron. La novan lernolibron de Esperanto oni devas nepre **traler**ni (**ellerni**).

Finante, mi aldonas kelkajn proverbojn el la Proverbaro Esperanta prilaborita de nia majstro Ludoviko Lazaro Zamenhof:

- Tra unu orelo eniras, tra la dua eliras.
- Tra la ventego la voĉo ne aŭdiĝas.
- Pelu mizeron tra l' pordo, ĝi revenos tra l' fenestro.
- Tra vitro de teruro pligrandiĝas la mezuro.
- Traflugis anĝelo preter orelo.
- Oni devas tralavi la gorĝon.
- Peto kaj demando kondukas tra l' tuta lando.
- Eĉ pinglo povas la koron trapiki.
- Vivon travivi estas art' malfacila.
- Multaj vivas iele trapele.

Czesław Baranowski

Pri la milito en Irako

Plej oftaj informoj en medioj koncernas la militon en Irako. Pia, religia Bush invadis kun grandega milita potenco Irakon sub falsa preteksto, sed kies ĉefa celo estis iraka nafto kaj perspektivo de grandaj profitoj. Li faris tion spite al opinioj de Unuiĝintaj Nacioj kaj la papo.

Oni povas pruvi analogion al Hitlera invado al Pollando en 1939. Altranguloj de pola registaro, precipe la prezidento kaj ĉefministro, tuj anoncis aliĝon al tiu bandita invado polajn soldatojn al konsento-aprobo. Honto kaj maltranguloj! Multaj aliaj klakistoj tuj la ekspedon de poko. Evidente tiuj, esperis grandajn skono de Bush kaj dento Kwaśniewko de Usono.

Kaj kia estas de vivo en detruo-aktoj de detruo do. Mortigitaj estas — „teroristoj”, sed „senkulpaj” usonano demokracio, venis Usonon.

Kaj tiu senĉesa, gando en medioj, ke la decido ekspedi polajn soldatojn estis prava kaj justa, ke ili tien ekveturis defendi la polan patrujon — naŭzas ĝis eltenkapablo. Oni ĉiam parolas pri bataloj kun aĉaj irakaj teroristoj. Sed oni devas malkaŝe, laŭte diri la veron: **tio estas milito** de irakanoj kontraŭ invadintojn. Irakanoj batalas por sia sendependeco. Ili batalas laŭ ilia ebleco, per eksplodaĵoj, dediĉante sian pro-

*Ĉi tiun artikolon de nia plej v-
gla (malgraŭ 80-jara) leganto,
mi aperigas post iom da prokra-
sto. Dum tiu tempo mi pripen-
sadis, ĉu akraj vortoj kaj akuzoj
de la aŭtoro estas konvenaj por
esperantista revuo. Kaj mi opi-
nias, ke kvankam ili NE estas kon-
venaj, la teksto devus aperi, ĉar
neniu alia skribis pri la milito per
pli finpensitaj vortoj, kaj la temo
en si mem estas tre grava.*

*Kiel redaktoro kaj simple kiel ho-
mo, mi volas batali nek per armi-
loj, nek per vortoj, kun presiden-
toj kaj mondaj potenculoj. Tiom
pli, ke tio rezultos per nenio. En
mia spirita vivo ĉiutage abundas
armiloj, kontraŭ kiuj batali eble
la vivo ne sufiĉos. Kaj anstataŭ
esperi pri starigo de niaj gvidan-
toj antaŭ la tribunalojn, ni elektu
homojn pli saĝajn kaj pacaman-
tajn.*

Kazimierz Leja

kaj decidis ekspedi Irako, sen pli frua de pola parlamen- honoro al polaj al- polaj ĵurnalistoj kaj komencis pravigi laj soldatoj al Ira- kiuj pri tio decidis, profitojn, agno- rekonon al presi- ski — granda ami-

la rezulto? Infero ta Irako, Ĉiutagaj kaj morta rikolta- precipe irakanoj ankaŭ pli ol mil noj, portantaj uso- ankaŭ en ĉerkoj re-

mensoga propa-

Mortis Tadeusz Chrobak

Tute neatendite mortis Tadeusz. Kompreneble korinfarkto. La 28an de aŭgusto, sabate matene en la hejmo en Koziegłowy apud Poznań. Dum la entombigo adiaŭis lin homamaso, en kiu: cento da poznanaj kaj polaj esperantistoj. Lidia Ligęza kaj Grzegorz Turbański en siaj funebraj elpaŝoj ĉefe diris pri niaj sentoj post forpaso de Tadeusz, kiu por multaj estis vera amiko. Pola Esperanto-movado perdis eminentan aktivulon kaj organizanton.

Li inter alie estis prezidanto de Vojevodiaj Filioj de Pola Esperanto-Asocio en Leszno kaj Poznań, vicprezidinto de la Ĉefa Estraro de PEA, estro de Kultura Esperanto-Centro „Orbita-Poznań”, fondinto kaj prezidanto de Grandpolia Esperanto-Asocio. Sed plejmulto konis lin kiel organizanton kaj gvidanton de Artaj Konfrontoj en Esperanto „ARKONES”. Ĉijare ĝi okazos jam dudekan fojon, bedaŭrinde sen Tadeo. Ni memoros lin kiel humurplenan, energian kaj originan gvidanton de la aranĝo. Li plurfoje gvidis primovadajn diskutrondojn.

Estus bone se ni realigus, aŭ minimume rimarkus, konkludojn de ili.

Laŭ eduko li estis juristo. Profesie estris plurajn gravajn entreprenojn kaj kooperativojn, estis elektata al regionaj regaj kaj administraj instancoj. Tadeusz vivis 54 jarojn.

Li vivos en nia memoro kaj restos en niaj koroj.

Paweł Janowczyk



↳ pran vivon, kaj usonanoj detruas kaj murdas per alta milita tekniko, per tankoj, helikopteroj, aviadiloj, raketoj. Malgranda iraka popolo batalas kontraŭ potenca agresema, imperialisma ŝtato.

Pro tiu faŝisma invado oni devas Bush'on kaj liajn helpantojn starigi antaŭ la Internacian Tribunalon de Justeco, same kiel oni faras kun Miloŝević kaj aliaj, sed Bush deklaris, ke neniu usona civitano estos prijuĝata pere de tiu Tribunalo. Li estas potenca kaj mokas pri la Internacia Tribunalo.

Sed mi esperas, ke polaj prominentuloj, kiuj memvole ekspedis polajn soldatojn por tiu faŝisma invado, devas iam ekstari kaj respondi almenaŭ antaŭ Pola Tribunalo. Mi tion esperas kaj atendas

XX ARKONES POZNAŃ 2004

Tri novaj spektakloj speciale preparitaj por la aranĝo ornamis la Konfrontojn. Unue prapremiera „Iĝ” — avangarda prezentaĵo en plenumo de la aŭtoro Jarlo Martelmonto, Krzysztof Usakiewicz, Lu Wunsch Rolshoven kaj Zuzanna Kornicka–Stępniaĉ. La aŭtoro ricevis ĉijare la premion „Verko de la Jaro” pro la libro „Ceterceter”. Due „Laodamia” — laŭ la dramo de Stanisław Wyspiański esperantigita far Czesław Straburzyński — prezentita de Junulara Teatro Instigo el Gorzów Wielkopolski. Reĝisoris Ludwina Nowicka; ĉefrolis Małgorzata Ławrynowicz, kunludis Bogusława Ławrynowicz, Karina Stanek kaj Tobiasz Kaźmierski. Trie „Kontaktoj” — laŭ tekstoj de poznana verkisto Łukasz Mikołajewski. La spektaklon prezentis teatra grupo Spontanea (Tobiasz Kaźmierski, Zbigniew Kornicki, Łukasz Mikołajewski, Bogusława kaj Małgorzata Ławrynowicz, Daria Skrzypczak kaj Karina Stanek).

En moderna kaj simpatia arkone-sejo — la lernejo „Lejery” okazis tri fotoekspozicioj: „Transigoj” de Iłona Ejsmont, „Esperantaj aranĝoj” kaj „Impresoj” de Andrzej Sochacki. La amasloĝejon plenŝtopis grupo de PEJ-anoj (ĉefe el Varsovia Vento), kiuj sub gvido de PEJ-prezidantino Irmina Szustak vigle diskutis organizajn aferojn de PEJ kaj IJK de TEJO en Zakopane. La junaj spektantoj ĝuis recitalojn de Zuzanna Kornicka–Stępniaĉ

— „Koncerto dediĉe al Tadeo”, Georgo Handzlik — „Mi volas danki vin ...” kaj Moliere Ngangu Nduantoni — „Afrika muziko”.

Impone funkciis la plej riĉa en Pollando E-libroservo, kiun gvidas Paweł Janowczyk. Averaĝe ĉiu arkonesano aĉetis pli ol du librojn. Kiel ĉiam prezentiĝis multaj Esperantaj eldonejoj, gazetoj kaj aranĝoj.

Post la ĵusa morto de Tadeo Chrobak — plurfoje rememorata dum la aranĝo — gvidon de primovada paneldiskutrondo transprenis Ireneusz Bobrzak kaj ĉiujn programerojn anoncis kaj gvidis Tobiasz Kaźmierski kaj Zuzanna Kornicka. Okazis aŭtoro vespero kun István Ertl, publika renkontiĝo de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA), diskutrondo de ŝatantoj de la Esperanta Poezio sub gvido de Maria Majerczak, trejngrupoj pri interpersona komunikado gviditaj de Jerzy Rządcki, prezentoj de videofilmoj („Sieĝo de Malborko”, „Raporto pri UK en Pekino” kaj „Kamenskrapisto”). La 45an jubileon festis Esperanto-Redakcio de Pola Radio. Pri siaj travivaĵoj parolis Grzegorz Turbański (proze) kaj Tadeusz Chmiel (poezie). Dum „Miela vespero”, kiun tradicie gvidis Ela Malik amuzis nin Junulara Sakŝalma Grupo „Kozłary” kaj modernstila dancgrupo „United Project”.

Walter Ŝelazny kaj Tomasz Chmielik prezentis projekton de la deklaro pri la okazintaĵoj en PEA en 1985 jaro, kiun individue subskribis dekelkaj personoj. Simile Zbigniew Galor resu-

mis diskuton kaj postvivon de Poznana Proklamo el 2003 jaro.

En abunda seminaria programo prelegis: Augusto Casquero de la Cruz, Tomasz Chmielik, Aida Čížikáté, Witold Czerwiński, Roman Dobrzyński, István Ertl, Halina Gorecka, Andrzej Grzębowski, Zbigniew Kornicki, Ilona Koutny, Bojidar Leonov, Lidia Ligęza, Maria Majerczak, Bradio Moro III, Moliere Ngangu Nduantoni, Barbara Pietrzak, Katarzyna Tempczyk, Walter Źelazny.

Arkonesan forumon okaze de ties dudekfojiĝo vizitis direktoro de Arta kaj Kultura Departemento de Urba Estraro por persone enmanigi gratuleterojn al la ĉeforganizantoj de Arkones: Paweł Janowczyk, Zbigniew Kornicki kaj Tobiasz Kaźmierski.

Arkones okazis inter 01 kaj 03 de la oktobro 2004 kaj partoprenis ĝin pli ol 190 personoj el 16 landoj. Pri Arkones raportis lokaj televido, radio kaj gazetaro. Ĝi, kiel kutime, okazis tuj post la sesio de Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (25.09–01.10.2004). Detalaĵojn pri Arkonesoj kaj informojn pri la XXI Arkones (2005) vi trovos en la retejo: www.arkones.republika.pl

**Paweł Janowczyk
Zbigniew Kornicki**

Sur la fotoj de A. Sochacki:

1. Paweł Janowczyk malfermas la kongreson. 2. Akceptejo kaj libroservo. 3. Istvan Ertl prelegas 4. Parto de partoprenantoj en la salono.



Miaj impresoj pri restado en Martinus-Instituto

Ĉiujare en Instituto de Martinus en Klint (proksime de Kopenhago), okazas la Esperanto-kurso, organizata de la Martinus-Centro en Danlando, kies sidejo troviĝas en Kopenhago en la loĝejo de dana verkisto Martinus (1890–1981). Ĝi estas memstara institucio, uzanta Esperanton kiel internacian lingvon. Partoprenas aranĝojn esperantistoj el diversaj landoj, kiuj interesiĝas pri reinkarniĝo.

Esperanto-semajno en Klint estas vera ripozo: sana por korpo kaj por la menso. Esperantistoj renkontiĝas ĉi tie por interdiskuti pri la teorio de Martinus, kaj ankaŭ aŭskulti prelegojn pri Kosmologio de Martinus. Ĝi informas pri nova mondbildo kaj nova mondkulturo. La temo estas ege interesa, donas logikajn respondojn al fundamentaj demandoj de la vivo. Se la scienco montras, ke ĉiuj ŝanĝoj en la fizika mondo estas leĝoligitaj, Martinus pruvigis, ke ekzistas leĝoj por la pensado.

Vegetarana manĝaĵo, pitoreska pejzaĝo sur la marbordo, amikeca atmosfero, interesa konversacio de logikaj vivanalizoj kaj ankaŭ bona okazo perfektigi Esperanton faras, ke E-ferioloko en Klint allogas interesantojn. Bedaŭrinde ankoraŭ ne polajn esperantistojn. Ĉu ilin ne interesas reinkarniĝo? Multaj landoj jam tradukis verkojn de Martinus.

Mi ŝatus instigi polajn esperantistojn al studado de verkoj de Martinus.

Kelkajn citaĵojn kaj aliajn informojn vi povas trovi en la ttt-paĝaro sub la adreso (en unu linio):

www.martinus.dk/layout_pages/

[index.php?lang=eo](http://www.martinus.dk/layout_pages/index.php?lang=eo)

Kun salutoj

Marta Romanowska



Esperanto kaj nova internacia lingva ordo

En Pola Esperantisto 4/2004 estis aperigita la Pekina Deklaro 2004 de la 89a UK en Pekino. Tiu ĉi Deklaro postulas novan internacian lingvan ordon, sen superrego de iuj lingvoj super aliaj, kun neŭtrala komuna lingvo kiel kerna elemento, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj de la mondo. Tio estus esenca por internacia interkompreno kaj pacca kunlaboro.

En la sama numero de PE aperis ankaŭ la artikolo de Christia Pinard sub la titolo „Kia eŭropo, kia mondo bezonas Esperanton?”. Tiu ĉi artikolo esprimas dubojn, ĉu estas taŭga ankoraŭ alparoli la „povulojn”, t.e. la oficialajn instituciojn afere de la internacia lingvo, ĉar — kiel diras S-ro Pinard — la povuloj havas aktuale aliajn interesojn.

Mi opinias, ke en ĉiu kazo estas neevitebla turni sin al la oficialaj institucioj, ĉar ni ĉiam devas argumenti je la plej alta nivelo kaj paroli kun tiuj, kiuj povas decidi. Tio tute ne elbaras ke ni parolas kaj kunlaboras kun

la neoficialaj, internaciaj asocioj kaj al altermondialistoj. Ni ĉiam devas prezenti kaj proponi nian lingvon — ni ne povas nenion alian fari.

Malgraŭ tio ni povas — ne: ni ne pre devas — fari ion alian. Ni cxiam devas kritike rigardi la E-lingvon kaj demandi nin, ĉu ne estas pliboniginda. Certe ne estas bona strategio rigide akcenti la fakton ke Esperanto pruvigis dum pli ol cent jaroj siajn utilecon kaj praktikecon, sen serioze demandi sin, ĉu vere Esperanto estas la plej utila, la plej praktikebla internacia lingvo. Ĉar la estonta internacia lingvo devas esti la plej bona, plej taŭga, plej elaborata lingvo, kiun oni povus imagi. Mi ne bone komprenas, kial Akademio de Esperanto neniam permesas ŝanĝojn kaj plibonigojn de la sistemo establita de L. L. Zamenhof, tiom pli, ĉar Zamenhof mem volis enkonduki kelkajn ŝanĝojn.

Estas evidenta, ke en la estonteco la mondo bezonos universalan lingvon (kaj sufiĉe da kaŭzoj sugestas, ke tio devus esti artefarita lingvo). Aktuale, pli kaj pli ofte, junaj personoj estas petitaj aŭ stimilitaj lerni ne nur unu, sed du, tri aŭ pli fremdajn lingvojn, ekzemple en Pollando krom la angla nun estas proponataj ne nur la franca, la germana aŭ la hispana, sed ankaŭ la serba, la kroata, la ukraina, la araba, ktp.; en Germanio pli kaj pli da personoj eklernas la polan, la ĉeĥan, la hungaran ktp. Eĉ la japana kaj la ĉina jam estas serioze konsiderataj. Tial rapide alvenos la momento, kiam estos evi-

denta, ke la homaro devas havi unu universalan lingvon (evidente krom la naciaj lingvoj). Tiel estas la tendenco de la evoluo.

La plej fundamentaj spiritaj principoj devas regi la definitivan elekton kaj enkondukon de la universala lingvo, ĉar tiu lingvo devas esti kapabla esprimi la plej altajn ideojn, pensojn kaj nociojn de la homaro. Pro tio ankaŭ estas evidenta, ke tiu tuta proceso estos plenumita en interkonsento kaj harmonio kun la plej fundaj principoj de religio, ĉar ne ekzistas en la tuta mondo pli fundaj spiritaj principoj ol jenaj, kiuj rilatas al kredo de la homo al Dio.

La elekto kaj enkonduko de universala mondlingvo estos signo de konsiderinda spirita evoluo de la tuta homaro, signo de matureco.

Klaus Krieger



12 tagoj en paradizo...

Dekdu tagojn, kiel en la fabelo kaj paradizo, mi travivis en Pollando, malgraŭ tio, ke mi ne kaptis oran fiŝeton, kiu povas plenumi dezirojn.

Tiu ĉi letero estas mia esprimo al miaj geamikoj en Pollando. Mia vojaĝo komencis la 8an de septembro en Gliwice. En la stacidomo atendis min mia amiko Olek Zdechlik. Mia havis eblecon kun prezidanto de PEA, Staszek [Mandrak — red.], trarigardi belegan ekspozicion en Zabrze sub titolo „La tero de la ĉielo”. La ekspoz-

zicio estas portreto de plado ĉe la sojlo de la XXI jarcento. Kun miaj amikoj mi vizitis direktoron de la elstara industria lernejo, havanta ĝemelajn rilatojn kun nia industria lernejo en Přerov. Post du tagoj mi forveturis al Gorzów Wielkopolski. Tie atendis min geedzoj Szafranec el Jenin. Al ili alvetursi mia longjara amiko, pastro Kazimir Noculak, kaj ni ambaŭ forveturis al lia paroĥejo en Bobrówko. Mi ekkonis lian paroĥestron Ryszard. Mi ne povas forgesi la futbalmatĉon inter policistoj kaj pastroj. La plej feliĉa estis Jadwiga Szafranec, ĉar ŝi du lotado gajnis biciklon!

Plue zorgis pri mi ankaŭ Broniek Fedorowicz, kiu plenumis mian deziron kaj veturis kun mi al Kamień Pomorski ĉe la maro. Malgraŭ tio, ke la akvo en la maro estis malvarma, mi lavis en ĝi miajn piedojn kaj Broniek naĝis. Poste mi estis en la manoj de amiko Błażej Kaczmarek, kiu zorgis pri miaj plujaj ekskursoj. El Słońsk ni veturis al Kostrzyn, trarigardis ĝin kaj pluen en muzeon Seelower en Germanio.

Mi havis tiom multe da impresoj, ke mi povus ankoraŭ skribi pri tio artikolon. La 18an mi revenis al Gliwice kie estis komenco de mia tre belega vojo, plena de novaj impresoj. Reveninte hejmen mi nur rememoras, dankas al ĉiuj, kiuj zorgis pri mi kaj mi reciproke diras al ili: „Mia domo estas via domo”, en kiu vi povas kiam ajn ripozi.

Ludvík Chytil, Ĉeĥio

La recenzo de nekutima verko...

Antaŭnelonge aperis nekutima verko (esearo) de Zofia Banet-Fornalowa, „La Pereintoj in Memoriam”. Pro kio la verko estas nekutima? Pro tio, ke ĝi priskribas la sorton de judoj en la landoj sklavigitaj de hitlera reĝimo, aŭ ĝia nehoma ideo (komprenu, ne temas pri germanoj kiel popolo, sed pri perforto ĝenerale). Aliflanke, ĉiuj bone scias, ke la gehenon por la mondo tiutempe kreis la germanoj.

Nekutimeco de la esearo de sinjorino Zofia ŝlosiĝas ankaŭ en tio, ke ŝi rakontas pri pollandaj esperantistoj, kiuj antaŭ ol trafis al murdejoj de germanaj nazioj kaj krimaj perversaĵoj, plenumadis gravan rolon por Esperanto, por ĝia Movado, ne nur en Pollando. La eseoj rakontas nur pri ses personoj, sed ili grave influis kaj influas ankaŭ nune al la tuta Movado. Temas pri: Leo Belmont, Halina Weinstein, Edvardo Wiesenfeld, Izrael Lejzerowicz, Jakobo Ŝapiro, Salomon Grenkamp-Kornfeld. Ili reprezentas ne nur aliajn esperantistojn kun simialaj sortoj (en tio grandiozan familion Zamenhof), sed ankaŭ akirajojn de la monda kulturo. En la libro krom eseoj antaŭitaj per portretoj, kiuj proksimigas nin al tiuj grandaj homaranoj kiujn la eseoj rilatas, troviĝas ilia belega poezio kaj prozo en Esperanto. Krome, poemoj de nuntempaj elstaraj polaj poetoj: Wisława Szymborska kaj Jerzy Ficowski en bonega traduko de Lidia Ligę-

za kaj Wojciech Usakiewicz, ankaŭ originalaĵo de Lodevijk Cornelis Deij. Tiuj lastaj formas honorigon de nuntempuloj al la Pereintoj.

Krom antaŭparolo de la Aŭtorino, troviĝas tie: listo de la enhavo, indekso de personoj, aldoniĝas amaso de bone prilaboritaj piednotoj, aparte gravaj por eksterlandanoj, helpante plene kompreni la enhavon. Evidente la Aŭtorino prezentas sian dankon al ĉiuj, kiuj helpis al pretigo de la verko. Ĉe la fino troviĝas sufiĉe abunda noto pri la Aŭtorino kun listigitaj ŝiaj aliaj verkoj.

La esearo estas eldonita de Eldonejo Hejme de Kazimierz Leja en la formato A5, 280 p. La verko estas estetike eldonita, kun griza kovrilpaĝo kaj nigraj surskriboj, konformaj al la enhavo de la libro.

La esearo devas restarigi la memoron pri la Pereintoj, laŭ komenca modo de la libro: „Iliaj spiritoj estingiĝas kiam Ili restas en forgeso...” Neniu vidis iliajn martirajn kaj kruelajn mortojn. Vidis tion nur la buĉistoj, ties viktimoj kaj Ununura Dio.

En grandaj murdkoncentrejoj tage kaj nokte funkciis gaskameroj en kiuj ĉiutage pereis proksimume dudek miloj da senkulpaj homoj. Komence kadavroj estis malprofunde fositaj en multaj kavoj. Post kelka tempo kadavraj gasoj suprenis grundon super ili kaj post foriro de gaso grunda kovraĵo denove malsupreniĝadis kaj la ciklo ripetiĝadis... Tio similis kvazaŭ tero spiritus kaj ĝemus... Ekzistis koncentre-

joj kiel ekz. Treblinka, kiujn la nazioj uzadis nur por senpaŭza mortigado. Tie la viktimoj travivadis nur ĉ. 45 minutojn; tio estis tempo por transiri el transporto al gaskameroj. Pri bruligado de kadavroj estis devigitaj helpi la judoj. La nazioj kreis de ili tiucele specialajn brigadojn kaj post iu tempo tiuj samaj devis iri al la gaso...

Oni neniam devas forgesi la martirajn Pereintojn.

Finante la impresojn pri la verko, kiu profunde kortuŝas kaj impresas, mi kliniĝas al la Aŭtorino pro ŝia granda kaj persista laborego. Mi dankas por ŝia bela stilo, lingva riĉaĵo, por kuraĝo kaj por amo al Esperanto!

Władek Szczepański



Trafaj rimarkoj de Christian Pinard

En *Pola Esperantisto* 4/2004 impresis min forte artikolo de Christian Pinard. Ĝi entenas tre gravajn konkludojn pri Esperanto kaj E-movado. Nia ĝisnuna konduto kaj espero, ke povuloj de tiu-ĉi mondo interkompreniĝos por enkonduki Esperanton por pli vasta uzo, estas naiva. Tio ne estas en ilia intereso.

Ankaŭ la neŭtraleco donas neniajn pozitivajn rezultojn. Oni devas, kiel skribas Christian Pinard, eniri al la neoficialaj internaciaj asocioj, kiuj fakte bezonas komunan lingvon, por batali por siaj rajtoj kaj kontraŭstari mondialistojn, ĉiam strebantaj pligrandigi

sian povon, sian staton de posedo, fine sian monon.

Ni kunlaboru kun altermondialistoj, kun internaciaj kaj humanismaj organizaĵoj, por proksimigi al ili ideon de komuna lingvo kiu helpas atingi iliajn celojn, por bono de la homoj, de la senpovuloj. Konstatoj de Christian Pinard estas tre trafaj, mi konsentas kun ili.

Estus tre bone, ke aktivuloj de la Esperanto-movado pritraktu tiujn konstatojn tre serioze kaj komencu agi tiudirekte.

Władysław Burszta



Labora kunsido de la Ĉefa Estraro de PEA en Varsovio – la 25an de septembro 2004 j.

Pasintmonate, la 25an de septembro 2004 j. okazis sekva labora kunsido de ĈE PEA en varsovia sidejo de la Filio de PEA ĉe la strato Andersa 37.

Estraranoj unuvoĉe akceptis protokolon de la lasta kunsido, kiu okazis en Pelplin en majo, regularon de la agado de PEJ, pridiskutis kaj akceptis la regularon de la agado de la Ĉefa Estraro de PEA. Pola Esperanto-Junularo estis fine restrukturita kaj aprobita kiel sekcio de PEA kun propra aktualigita regularo.

Estis akceptitaj personaj ŝanĝoj en konsisto de la ĉefa estraro t.e. oni akceptis la rezignon de s-ino Ewa Misior kaj enkondukon de Bogdan Mi-

chalski.

Pro alveno de invitita gastoj, japana biznesmeno-esperantisto Etsuo Miyoshi, prezidanto de PEA — Stanisław Mandrak prokrastis estraran debaton petante la gaston prezenti lian opinion pri rolo de Esperanto en la mondo.

Surbaze de jam presita intervjuo en la gazeto „Rzeczpospolita”, titolitan „Kial mi investas en Pollando”, Etsuo Miyoshi trafis kaj konvinke rakontis longan historion de organizaj, ekonomiaj, kaj lingvaj barieroj malhelpantaj lin dum kontinuada de biznesa agado. Resumante rakontadon la gastoj substrekiis nekontesteban rolon de Esperanto en rapida adopto de lingvomaterialo kaj ĝian propedeŭtikan rolon en instruado de aliaj lingvoj.

Finante kaj dankante la inviton, Etsuo Miyoshi oficiale invitis estraranojn al varsovia hotelo Victoria por partopreni organizatan de li dimanĉe parlamentan debaton pri „lingva egaleco en internaciaj rilatoj”.

Post adiaŭo de la gastoj, prezidanto de la kunsido proponis kontinudadon de estrara debato dum kiu estis referitaj pliboniĝantaj financoj, prosperantaj kursoj (korespondaj kaj interretaj) kaj pligrandiganta internacia kunlaboro.

La kunsido estis finita per tralego de Barcelona deklaro far’ prezidanto de PEA, kiu ĉeokaze kore dankis al prezidanto de varsovia filio Lech.Piotrowski pro gastema kaj afabla ekcepto de la estraranoj.

Debato pri lingva egaleco proponita al polaj parlamentanoj de japana biznesmeno

Historiaj momentoj en Esperantomovado ne ĉiam prezentas sin spektakle kaj fanfare. Kiam aperis unua lernolibro de „lingvo internacia” eldonita de „iu” dr Esperanto, pri la libro-evento orientiĝis nur la Aŭtoro, liaj familianoj kal loka presisto. Kiam la bulonja kongreso eklumis per „nova sento”, nur kelkcent samideanoj kaptis la ideon kaj amatorece propagandis ĝin tra la mondo.

Simile impresis prilingva debato organizita de japana biznesmeno — Etsuo Miyoshi en varsovia hotelo „Victoria” kun celo pridiskuti temon de „Lingva egaleco en internaciaj rilatoj”.

Kunvokitaj eksterlandaj gastoj, polaj parlamentanoj kaj eŭroparlamentanoj kaj fine estraranoj de Pola Esperanto Asocio amasiĝis en antaŭsalona koridoro atendante oficialan inaŭguron de la debato.

Profesie kaj kompetente gvidatan debaton inaŭguris senatano Zbigniew Jerzy Kulak, kiu konstatinte evidentan progreson de eŭropa integriĝo akcentis tro malrapidan proceson de lingva komuniĝo rezultitan de aplikado de ekonomiaj kriterioj en promociado de lingvoj en Eŭropa Unio. Tiel akceptita strategio danĝerigas minoritatajn lingvojn kaj des pli malvalorigas ŝancojn de Esperanto en integriga proceso — konkludis la senatano.

Sekva diskutanto, nobelpremiito pri ekonomio kaj esperantisto prof. Reinhard Selten, longe parolis pri pola ŝanco solvi lingvoproblemojn per Esperanto tiel, ke ĝi fariĝu eŭro- aŭ mondlingvo.

Oni devas substreki, ke diskutantoj kaj aŭditorio priservataj estis de simultana tradukado de polaj kaj Esperantaj tekstoj far’ redaktoro Andrzej Pettyn, kiu en „tradukista kabino” eminente interpretis publicistajn kaj politikajn opiniojn de partoprenantoj. Konferenca sperto en gvidado de la debato permesis al redaktoro Barbara Pietrzak krei inter parlamentanoj kaj gastoj, favoran kaj promocian etoson por demokratia koncepto de lingva egaleco, kiun pripense kaj antaŭvideme proponis Etsuo Miyoshi, ĉefa iniciatinto de la historia debato.

Inter sekvaj diskutantoj aperis eminentuloj kiel: dro inĝ. Zalewski-Zamenhof, nepo de L. L. Zamenhof, prof. Helmar Frank — AIS-prezidanto, prof. Witold Stępniewski — vice-rektoro de Politekniko en Lublin, prof. Renato Corsetti — UEA-prezidanto, Małgorzata Handzlik — eŭroparlamentanino, Ryszard Czarnecki — parlamentano kaj aliaj.

La debaton finis prezidanto de PEA — Stanisław Mandrak, kore dankante al diskutantoj objektivan prezenton de iliaj vidpunktoj kaj rememorigante la vortojn de fama esperantisto prof. Zenon Klemensiewicz : „Esperanto estas akiraĵo de pola kulturo”.

Dum lunĉo organizita en formo de

sveda tablo, partoprenantoj de la debato interŝanĝis privatajn opiniojn pri nova etapo de la Esperanto, kiu de „amikeca kaj utopia mondo” eniras novan, biznesan mondon, regatan de ekonomiaj kaj ne malofte ĝangalaj reguloj.

Ne forgesante multjaran kaj efikan popularigadon de Esperanto en urbaj instancoj de Malbork, prezidanto de PEA honorigis dum la lunĉo, per verdstela insigno de „Merita esperantisto”, sinjorinon Danuta Stanek-Gutowska — eksurbestrinon de Malbork kaj sinjoron Edward Kozyra — multjaran E-aktivulon kaj amikan konsultanton de Etsuo Miyoshi — unua verda biznesmeno en Pollando.

Raportis: Jerzy Walaszek



Renkontiĝo de katolikaj esperantistoj en Niepokalanów

La 18an de septembro 2004 okazis en Niepokalanów en la jaro de s-ta Maksimiliano Kolbe la renkontiĝo de katolikaj esperantistoj. Venis gesamideanoj el la diversaj lokoj de Pollando.

Niepokalanów (Senmakulejo), jam ne unuan fojon gastigis la verdstelanojn. Jam antaŭ multaj jaroj okazis tie la Simpozio, kiun organizis jam ne vivanta pastro Paruzel. Ĝuste nun oni rememorigis ankaŭ tiujn tempojn, kiam la katolikajn kaj Esperantajn aranĝojn partoprenis multaj pastroj esperanti-

stoj kaj gesamideanoj.

Niepokalanów, la loko de Dipatrino Maria Senmakula. Ĉi tie kreis la monahejon, laboris, agis s-ta Maksimiliano Kolbe, eksterordinara laŭdanto de Maria, nomata „La Avarulo de Senmakula”.

En la Sanktejo mankas liaj relikvoj, ĉar lian korpon oni bruligis en krematorio kaj la cindrojn oni disjetis. Apud la baziliko staras nur la monumento de la sanktulo fondita sur la placo en la 100a datreveno de lia naskiĝo en 1994 jaro. Pri la s-ta Maksimiliano, lia agado en Pollando kaj eksterlande, kie li ankaŭ kreis Senmakulejon en Japanio rakontis dum la prelego pastro Roman Forycki.

Poste s-ino Szanser bonege kaj interese prezentis kaj rememorigis la antaŭajn aranĝojn, kiuj okazis en Niepokalanów, montris la fotojn el la Simpozio ktp. Post ŝiaj rememoroj okazis la poezia programero dum kiu oni prezentis la religiajn poemojn kaj diversajn epigramojn. Je la 12a horo la partoprenantoj preĝis la angeluson apud la altaro de s-ta Maksimiliano en baziliko, kie troviĝas inter alie la Esperanta tabulo dediĉita en 1974 jaro al Maksimiliano Kolbe, sur kiu ni povas tralegi la jenajn vortojn:

Kavaliro Esperanto
trovus certan sukceson
eĉ ĉi tie en Japanujo

El la letero al P.J. Nazim
Mugenzai no Sono, 1931
kaj ankaŭ:

Via partopreno en la
Esperanto Mondmovado
plaĉas al la Senmakula

Koresponde al polaj esperanti-
stoj, 1937

tiun ĉi tabulon fondis
omaĝe al sia Ĉiela Patrono
Pola Katolika Unuiĝo Esperantista

Post la angeluso kaj individuaj pre-
ĝoj oni rigardis belegan panoramon,
kiu prezentas la miljaran historion de
Pollando.

La s-tan meson esperantlingve kun-
celebris 2 pastroj esperantistoj: pastro
Stanislavo Płatek kaj pastro Romano
Forycki kaj unu patro franciskano el la
monahejo en Niepokalanów. Ĝi oka-
zis en malnova kapelo de s-ta Mak-
similiano. Poste gesamideanoj vizi-
tis la tombejon, kie estas estombigitaj
la monahoj sed ne nur. En la tombe-
jo estas ekzemple la tombo de la ho-
mo, anstataŭ kiu Maksimiliano estis
mortigita, do temas pri Gajowniczek
[Gajovniček], kiu ankoraŭ longe vivis.

Ankaŭ estas tie entombigita frato
de s-ta Maksimiliano kaj franciska-
no el Niepokalanów — frato Kornel
Kaczmarek, esperantisto, kiu mul-
te agis por Esperanto, partoprenis
E-aranĝojn ktp. Gesamideanoj preĝis
ĉe lia tombo.

La aranĝo en Niepokalanów daŭris
preskaŭ la tutan tagon, sed estis ve-
re bonege organizita de s-ro Bohdan
Wasilewski al kiu helpis s-ino Kry-
styna Zmitrowicz. Estis ebleco rigar-
di ankaŭ la ekspoziciojn pri la diversaj

katolikaj aranĝoj, fotoj ktp.

Oni devas esti dankemaj pro la ini-
ciato al Esperanto Sekcio ĉe la Klubo
de Katolika Intelektularo en Varsovio.

Bogusław Sobol



**La 30an de junio 2004 post 84-jara
vivo mortis en Kielce**

HALINA BREDE

**esperantistino ekde 1968 jaro,
instruistino de Esperanto,
aktiva ĝis lastaj tagoj.**

**Dum la Dua Mondmilito ŝi estis tre
aktiva en konspira skolta organizo
„Szare Szeregi”.**

**Kun granda tristo ni adiaŭas ŝin
esperantistoj el Kielce**



La Esperanto-Societo FLAMO en
Toruń deziras sciigi pri la apero de no-
va libro. Ĝi estas verkadlibro de la ko-
nata Esperanto-poeto Eugeniusz Mat-
kowski, eldonita okaze de la dekjara
mortodatreveno de la poeto.

La 60-paĝa libro enhavas 33 verk-
aĵojn en bona E-lingvaĵo: 28 poemojn
kaj 5 prozaĵojn. La libro enhavas ankaŭ
verkistan biografion de la aŭtoro. Pre-
zo: 27,40 PLN.

Esperanto-Societo FLAMO

PL 87-100 Toruń, skrytka 16.



**Aldone al tiu ĉi numero vi tro-
vos pagilon por reabono de PE por
la jaro 2005. Ne necesas sendi kro-
man abonilon, tamen se iu ŝanĝis
la adreson, bv. skribi ĝin, kun poŝta
kodo. Pagu frue vian kotizon!**

ONI BEZONAS PROFESOROJN POR INTERNACIA STUDUMO EN BYDGOSZCZ

Kiel ĉiuj scias, en Bydgoszcz (Polando) funkcias ekde deko da jaroj la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kie studentoj de la tuta mondo povas studi karieron pri turismiko pere de la internacia lingvo Esperanto.

La studentoj povas akiri tri nivelaĵajn diplomojn, t.e. Bakalaŭro (tri jarojn), Magistro (aldonaj du jarojn) kaj daŭrigi studadon ĉe AIS–San Marino por Doktorigo, krom ricevi aliajn titolojn kaj atestojn..

La titoloj estas agnoskitaj de la pola Ministerio pri Edukado, kaj por AIS–San marino, kio donas al tiuj titoloj internacian valoron.

Nuna financa situacio de la Studumo estas ne bona, kaj ĝi estas en grava risko malaperi.

Ne oni povas permesi ke tio okazu; ke tiel grava projekto por la movado simple malaperu.

Ni petas profesorojn de la tuta mondo, kiuj pretu veni al Bydgoszcz por instrui, por unu semajnon, du tri, ktp, laŭ forme de rapidaj kursoj aŭ seminarioj, kiuj donos al la studentoj eblecon konatiĝi kun temoj rilataj al la tuta mondo.

La Studumo havigas al la profesoroj kiuj volas veni modestan ĉambron por tranokti, ĉe la Studumo, kaj iomete da helpo por la manĝo. Ne eblas iun monon pagi.

La instruado tie estas ege alloga,

ĉar studentoj estas el diversaj landoj kaj kontinentoj, kaj la instruado okazas pere de la lingvo Esperanto.

La profesoroj devas intrui pri temoj kiuj havu iun rilaton al lingvoj, kulturoj, tradicioj, monumentoj, tursimon en la diversaj mondopartoj.

Gravas ke la profesoroj havu instrukapablon, kaj scipovu havi bonan rilaton kun la gestudentoj.

Volontuloj kontaktu Augusto Casquero, augustocasquero@hotmail.com.

La lernojaro komenciĝos jam en oktobro.

La aldona foto estas de la lasta AIS–sesio en Komarno (Slovakio) fine de aŭgusto–komenco de septembro, kie la polaj studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kaj bakalaŭroj kaj magistroj (19) havis grandegan sukceson. Ĉiuj sukcesis en la finaj ekzamenoj, kaj ricevis altajn notojn.

Augusto Casquero (Hispanio)
Profesoro de la Studumo



Somera ferio 2004

Ni jam estas hejme, feliĉe reveninte sen grandaj problemoj (estis nur malgrandaj). Unue ni veturis al niaj belgaj amikoj kie ni restis tri tagojn. Krom la babilado, naĝado kaj renkontiĝoj kun aliaj belgaj konatuloj ni vizitis tre interesan „Temparkon” kie ni vidis multajn konstruaĵojn karakterizaj por diversaj landoj aŭ regionoj. Ĉe konstruaĵo „fontano di Trevi” ni faris foton por poste kompari ĉe vera konstruaĵo (estis nur simila). Post la forveturo el Belgio ĉio estis en ordo ĝis Francio. Ĉar ni elektis la vojon por ne pagi aŭtoŝoseon ni devis „iomete” nervoziĝi. Laŭ la mapo kiun ni posedis (la mapo de la Eŭropo) post nelonga tempo okazis, ke oni ne povas bone vojaĝi. Ni devis aĉeti pli detalan mapon de Francio. Ĉi tio helpis multe sed ne ĝisfine. Malgraŭ tio ni ne povis facile trovi la vojon. Sur la mapo estis bone surskribitaj la numeroj de la vojoj sed reale survoje „iomete” mankis la signoj de la vojoj. Finfine ni sukcesis alveni al Parizo ĉirkaŭ la 16a.

Jam pli frue ni decidis, ke ĉi-tage ni jam ne povas viziti la Eŭrodisneylandon. Ni trovis la tranoktlokon por ni sed ne por nia aŭtomobilo. Ni devis lasi ĝin tre malproksime kaj piediri al niaj gastigantoj, anoj de Pasporta Servo. Okazis, ke ili ankoraŭ ne estas hejme, pro tio ni vizitis ĉirkaŭaĵon revenante al nia aŭtomobilo (sufiĉe agrablan malnovan parton de la urbo).

Ĉirkaŭ la 19a jam estis hejme unu de niaj gastigantoj — Ann. Ŝi estas juna, bela belga fraŭlino, kiu studis en Germanujo ekonomion kaj nun laboras en Parizo kaj loĝas kun Franck — juna franco, kiu laboras kiel librotenisto. Li revenis hejmen tuj post la 20a. Kun ili ni vizitis nokte kelkajn la plej vidindajn lokojn en Parizo (tre rapide). Intertempe ni eksciis, ke la bileto al Eŭrodisneylando kostas pli ol ni pensis, tio estas 50 eŭroj por plenkreskulo kaj 30 por infano. Ni devis pripensi la aferon, ĉar nia scio pri la prezoj estis tia: 30 eŭroj kaj 15 por infano. Feliĉe okazis, ke Ann kaj Franck konas germanan esperantiston Uve, kiu laboras en Eŭrodisneylando kaj diris al ili, ke li volonte helpos precipe por Esperantaj familioj. **KAJ LI FARIS TION! NI ĈIUJ VIZITIS EŬRODISNEYLANDON SENPAGE!**

Estis tre interesa kaj amuza tago; de la 12a ĝis 22a ni ĝuis la vizitadon. Poste ni komencis nian veturon al Italio. Dum la veturado okazis, ke la vojo ne estas tiel rekta. Precipe ĉe la limo ni trovis spiralgirejojn, mortalajn kurvojn kaj sinuajojn kaj poste la similajn vojojn en Italio kelkfoje. Al mia fratino ni alvenis post 36 horoj. Vespere „salutis” nin granda pluvego pro tio preskaŭ ĉiuj niaj bagaĵoj restis en aŭtomobilo. Matene jam estis belega suna vetero do ni rapide veturis al la plaĝo. Mia bofrato posedas 5-personan pontonon kun motoro, do ni forfluis ĉirkaŭ 1 km de la bordo kie ni trovis puran kaj trankvilan

akvon. Tie ni sunbruniĝis kaj naĝis. Mi eĉ provis alnaĝi ĝis la bordo sed post ĉirkaŭ 500 metroj mi devis rezigni pro la danĝero de la meduzoj.

Ni ne povis ĉiuj kune esti sur la pontono do aliaj restis sur la plaĝo kaj poste ni ŝanĝadis. Kiam ni revenis al la aŭtomobilo okazis, ke oni forŝtelis niajn ĉiujn bagaĝojn. La aŭtomobilo restis malplena. Feliĉe oni ne frakasis la fenestron, nur fortiris la vitron, mi riparis facile. Ni restis sen vestaĵoj, precipe Karolina.

Venontan tagon ni aĉetis iom da vestaĵojn. Krom ni mia fratino gastigis ĉe ŝi ankaŭ du infanojn de nia alia fratino, do ni estis 9 personoj. Ni ne sunbruniĝis tro longtempe, post la 11a ni revenadis hejmen kaj posttagmeze ĉirkaŭ la 17a ni revenadis al la plaĝo. Marde posttagmeze ni vizitis Romon dum 6 horoj. Merkrede mia fratino kun edzo kaj 2 infanoj de mia alia fratino forveturis libertempe al la insulo Sardenio, kie familio de ŝia edzo havas domon. Ni restis solaj en ŝia domo. Ni faris la samon: dufoje dum la tago al la plaĝo sed nun sen uzado de la pontono. Ni zorgis pri 2 hundoj, 5 katoj kaj 9 kokinoj kiujn posedas mia fratino. Unu tagon antaŭ nia forveturo katino naskigis 5 katiidojn. Monika tre ĝojis kaj zorgis pri la katetoj. Post 24 horoj de vojaĝo ni revenis hejmen.

Saluton!

Andreo kun familio

IJK 2005 en Pollando Ĉefa paĝo • Aliĝilo • Aliĝintoj

Nome de TEJO, PEJ kaj la klubo Varsovia Vento ni invitas vin al Pollando por partopreni la 61an Internacian Junularan Kongreson en Zakopane!

LOKO. Zakopane — Tatrj-montaro, rokoj en verda arbaro, nekredablaj vidindaĵoj kaj multaj aliaj allogaĵoj. Unika loka arkitekturo, folkloro, bona biero, pura akvo kaj aero, lokaj ŝafaj kaj kapraj fromaĝoj, ŝafaĵo kaj aliaj ebloj bonguste manĝi. Riĉa infrastrukturo de kafejoj, bierejoj kaj vendejoj... Foresto de kuloj! Ĝuste tial ni renkontiĝos nek en Varsovio, nek en Krakovo, nek en Bjalistoko, sed en Zakopane situanta en la centro de Mezeŭropo, ĉe la slovaka landlimo, proksime de Ĉeĥio, Hungario, Rumanio kaj Aŭstrio, relative proksime de Litovio, Ukrainio kaj Germanio.

PROGRAMO. La temo de IJK „Unueco en diverseco” koncernas egalrajtecon, tial ni proponas interalie lingvan festivalon por prezenti riĉon de eŭropaj (kaj ne nur) lingvoj. Krome aperos temoj pri komunikiloj de blindaj kaj surdaj homoj, kio tuŝas egalrajtecon de handikapuloj. Sed tio ne estas ĉio. Per diskutgrupoj, prelegoj kaj aliaj programeroj ni volus diversforme prezenti laŭeble multajn aspektojn de egalrajteco!

Post seriozaj debatoj oni devas re-laksi:) Kiamaniere? Ni planas organizi ĉiutagajn ekskursojn al montaro. Al tiuj, kiuj restos en la kongresejo, ni

proponos interalie diversnivelaĵn kursojn de Esperanto kaj de la pola, instruadon de polaj popoldancoj kaj partoprenon en elfarado de montarana fromaĝo el ŝafa lakto. Vi neniam forgesos ĝian guston kaj odoron :) Ĉu vi iam revis pri kariero de filma stelulo aŭ reĝisoro? Se jes, tiam dum IJK vi povos plenumi tiujn revojn!

Por vespera programo ni antaŭvidas koncertojn kaj teatraĵojn. Nokte okazos karaokeo kun E-muziko, disko-tekoj, film-prezentadoj ktp. Krome, kompreneble, eblos babili kun aliaj gesamideanoj, drinki kaj trinki...

Proksime de Zakopane troviĝas Krakovo, iama ĉefurbo de Pollando, rezidejo de polaj reĝoj kun mezepoka kaj renesanca arkitekturo. Estas ankaŭ Wieliczka (Vjelicĥka), unu el la plej malnovaj salminejoj en Eŭropo, kie oni povas promeni laŭ fascinaj koridoroj, viziti subteran kapelon el salo kaj sperti, kiel dum jarcentoj laboris la salministoj. Ambaŭ lokoj estos viziteblaj.

ALVETURO. Plej facile estas veni al Zakopane el Krakovo. Inter la du urboj veturas ĉirkaŭ 60 busoj kaj trajnoj tage. La busa vojaĝo daŭras ĉ. 2 horojn, la trajna 3-5 horojn (la montoj devigas rondiri). Dum pli malpli 2 horoj vi atingos Zakopane ankaŭ el la slovakaj urbo Poprad. En Krakovo kaj en Poprad funkcias internaciaj flughavenoj.

Se vi planas veni al Zakopane el UK en Vilno, uzu trajnon el la litovaj ĉefurboj al Varsovio. El Varsovio eblas

veturi per trajno aŭ buso rekte al Zakopane. Se sufiĉe multaj homoj emos vojaĝi laŭ tiu vojo, ni organizos komunan buson de UK al IJK.

UK -> IJK -> IJS... Nekredeble, ĉu? Post IJK vi bezonas nur momenton por translokiĝi al Hungario kaj partopreni IJS-on. Pripensu tion, ĉar ne ofte estas somero, kiam esperantistaj aranĝoj tiom proksimas geografie kaj laŭ datoj!

Pri la KOTIZOJ, LOĜKOSTOJ, MANĜADO ktp. kontaktu PEJ aŭ vizitu ĝian paĝaron:

www.pej.prv.pl

Fonto: Interreto

• **La Sankta Blbio** – nova eldono kun duakanonaj (katolikaj) libroj estas aĉetebla en Eldonejo HEJME. Prezo (egalvaloro de) 13,30 EUR + sendokostoj. Tiu ĉi prezo koncernas nur aĉetantojn de ekssocialismaj landoj.

• **Maciej Zgondek, Iĝu esperantisto! Samouczek języka esperanto.** Speciala oferto por junularo: prezo 16,00 zł + sendokostoj. Por kursgvidantoj, kiuj mendas 10 aŭ pli ekz., prezo 14,00 zł.

Baldaŭ aperos:

• **Jana Melichárková – Esperanto dla dzieci.** 60 + 12 pĝ kun aldona folio por instruisto.

Predike sed malefike...

Karaj legantoj de Pola Esperantisto,

en nekutima loko, per nekutima tiparo, tamen – kiel ĉiam – kun la kutima „predika” etoso, mi direktas kelkajn vortojn al tiuj, kiuj ĝin tralegos (ĉu estos multaj?).

Fakte de longa tempo mi ne skribis „normalan” leteron, tamen ĉiam tuj mi respondas al elektronikaj mesaĝoj, venantaj per Interreto. Tio certe estas la signo de l’ tempo, ke komputilo anstataŭas „normalajn” homajn rilatojn. Estas kaj negativaj kaj pozitivaj flankoj de tio. Pri negativaj mi silentu, la pozitivaj abundas: ŝparo de tempo, rapida komunikado, tiom necesa en galopanta mondo...

En antaŭaj numeroj de PE mi kelkfoje instigis vin ne nur skribi al la revuo, sed ankaŭ diskonigi informojn pri ĝia ekzisto. Por plua ekzisto de PE necesas varbi novajn abonantojn kaj ankaŭ koni viajn opiniojn kaj dezirojn. Estas vere malfacile trovi ĝustan vojon por kontentigi legantojn, ne sciante iliajn atendojn kaj rimarkojn... Strange, ke tiuj nemultaj, esprimitaj de kelkaj nur personoj, koncernis unu saman aferon: forigi la tekstojn saĝajn, valorajn, tamen tro „pezajn” por ili.

Tiu ĉi „ekzamenigo” de legantoj entute fiaskis, same kiel propono uzi libere lokon en la revuo por esperantistaj organizaĵoj, funkciantaj en nia lando. PE, kiu volis fariĝi vasta tribuno por plimulto de esperantistoj ĝis nun kun granda peno kolektas informojn kaj artikolojn, ofte de eksterlandaj fontoj. Silentas junularo, silentas aktivuloj, kvazaŭ nenio okazus en iliaj medioj. Ĉi tiuj faktoj kelkfoje instigis min pensi pri rezigno de plua eldonado de la revuo, ne vidante klarajn horizontojn de ĝia ekzisto. Tion aŭguris al mi ĵus forpasinta amiko Tadeusz, kun kies opinio mi ne volis iatempem konsenti.

Tamen, malgraŭ ĉiuj „obstinaj baroj” denove mi promesas, ka Pola Esperantisto vivos almenaŭ ĝis la jarfino de sia centjariĝo.

Atendante kontaktojn kun vi, ĉu personaj, ĉu virtualaj, mi sciigas ankaŭ pri mia iom modifita retadreso (vidu en kolofono sur 2a paĝo).

Humuro...

(La subaj ŝercoj — preskaŭ ĉiuj — devenas de pollingva libreto de Remigiusz kaj Andrzej Pettyn, sub la titolo „Uśmiech i medycyna”. La libreton tradukis subskribinto antaŭ kelkaj jaroj, kadre de lingvaj ekzercoj).

SENMOVA SEZONO

Kuracisto demandas kuraciston:

- Kio nova ĉe vi?
- Nenio nova. Senmova sezono. Ĉiuj sanaj...

TROMPITAJ ESPEROJ

Kuracisto ekzamenas malsanan milionulon. Ĉirkaŭ la lito de la malsanulo ariĝis multnombra grupeto da heredantoj. Kiam la kuracisto finis la ekzamenadon, unu el la heredantoj demandas:

- Sinjoro kuracisto, ĉu estas iaj esperoj?
- Neniaj! — respondas kuracisto. — La malsanulo travivas nur leĝeran gripon...

PREMIO

Kliento eniras apotekon kaj demandas:

- Ĉu vi ankoraŭ havas ĉi tiun reklamatan rimedon kontraŭ alopecio?
- Jes, ni havas ĝin — respondas la apotekisto kaj aldiras: — al ĉiu, kiu aĉetos 10 botelojn, ni donacas kiel premion... perukon!

KIEL FORKURACI KATARON?

En medicina librovendejo kliento demandas:

- Ĉu mi ricevos la broŝureton sub la titolo „Kiel kuraci kataron”?
- Jes, sed scienc-fikcia literaturo troviĝas en alia stando, tie en la angulo...

EKSTERORDINARA FEBRO

— Medicina Rapiĉservo? Bonege, mi petas, alvenu tuj! — krias iu virino al telefona aŭskultilo.

- Bone, sed kio okazis?
- Mia edzo havas kvindek gradojn da febro!
- En tiu okazo — konsilas la deĵoranta kuracisto — voku prefere fajrobrigadon...

tradukis: Zbigniew Tylkowski